


中國新道


EL POPOLA

CINIO











## INTER NI

Mi deziras legi artikolojn pri Konfuceo kaj Laŭzio.

**REEDIK OKSA (USSR)**

*Laŭ deziro de multaj legantoj ni malfermas ekde ĉi tiu numero la rubrikon "Ĉinaj Antikvaj Filozofoj", en kiu ni konigas al niaj legantoj la pensojn, doktrinojn, vivojn kaj influojn de ĉinaj antikvaj filozofoj inkluzive de Konfuceo kaj Laŭzio.*

**La Red.**

Por kontentigi ĉiujn legantojn de EPĈ estas necese ke la enhavo de EPĈ entenas multajn diversajn artikolojn kaj ankaŭ multajn kolorajn bildojn.

**HENRI LOFFROY (Francio)**

Mi volas scii nunan ĉiutagan vivon de ordinaraj ĉinoj. Kiu mastrumas kaj preparas manĝon? Kiel ili fartas en libera tempo? Kiajn amuzojn ili ŝatas? Kio estas ilia revo?

**ITOO YORIKO (Japanio)**

Tro ofta uzado de ĉinaj propraj nomoj por personoj, urboj ktp. ofte ĝenas min dum la legado de artikoloj. Oni nur uzu tiom da ĉinaj nomoj, kiom vere estas necesaj.

**JENS MERKER (DR Germanio)**



# ENHAVO

- 18 Kuna partopreno en ŝtataj aferoj  
 6 La satelito "Azio 1" sukcese lanĉita  
 46 Pekino birdvidata  
 30 **INTERVJUOJ:**  
 Esploristo en la lando de "Nigra Oro"  
 44 Sciencoj kaj teknikoj influantaj la ekziston de la homaro en la 90-aj jaroj  
 40 Pekina biero de nova gusto  
 16 Nova medicina kontribuo  
 42 **POR VIA SANO:**  
 Ĉina ĉigong-o (II)  
 9 Ĉinaj filmoj en la pasintaj 10 jaroj  
 27 **POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO:**  
 Pri "Chile-ebenaĵo"  
 13 **ANTIKAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:**  
 Filozofo rajdanta sur nigra bovo  
 52 **LA IMPERIESTRAL PALACO (10):**  
 Loĝejoj de la imperiestraj edzinoj en la dinastioj Ming kaj Qing


- 21 **LAŬ LA SUDA SILKAVOJO (14):**  
 Zhaotong, urbo de facila trafiko  
 43 **MI KAJ ĈINIO:**  
 Efikoplana ĉina kubo el EPĈ  
 38 **LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:**  
 Nia dubranĉa kulturo  
 35 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Miskompreno  
 20 **ESP-NOVAĴOJ:**  
 36 Maljunulejo por alilandanoj en Ĉinio  
 34 **AMUZOJ:**  
 32 **NIA MONDO:**  
 Moroj de Omano  
 26, 45 **KURANTAĴ AFEROJ:**  
 4 **INTERNI:**  
 39 **KORRESPONDISTOZIRAS:**  
**SUR LA KOVRILLO:**  
 Usonanino, kiu vivas en la maljunulejo de Harbin, Ĉinio  
**SUR LA DORSKOVRILO:**  
 Ĉina Masaĝo  
 2 La akvobaraĵo Gezhouba sur Yangzi-rivero  
 4 Sub pluvo

Foto de LIU SIGONG

Foto de PENG XIONGCAI

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Xichang
2. Tianjin
3. Tibeta Aŭtonoma Regiono




# La satelito "Azio 1" sukcese lanĉita

de ZHONG HUA


La transporta raketo kun la satelito lanĉita








La transporta raketo "Changzheng 3" en muntado




Muntado de la satelito "Azio 1"  
Foto de MENG LINGJUN



Ĉinaj kaj usonaj fakuloj diskutas pri la lanĉo de la satelito "Azio 1"

La regado ekbolis tuj post la sukcesa lanĉo de la satelito.





Ren Xinmin (dekstre); ĉefprojekto de la raketserio "Changzheng"

Por foti kaj mezuri la lanĉitan transportan raketon

Vespere de la 7-a de aprilo, en la Xichang-a Satelita Lanĉejo de Ĉinio estis sukcese lanĉita la satelito "Azio 1" farita de Usono per la ĉina transporta raketo "Changzheng 3".

Xichang, nomata Luna Urbo antikece, kun malaltaj latitudoj, situas alte super la marnivelo. Lanĉante tie sinkronan sateliton de la terglobo, oni povas utiligi la centrifugan forton naskitan de la rotacio de la terglobo kaj ŝpari la puŝforton de transporta raketo.

En la lanĉejo aparte okulfrapis la lakteblanka raketo "Changzheng 3" kun satelito peza je 1.24 tunoj. Sur la montodeklivo centoj da videoregistratoroj, kameraoj kaj fotografiloj estis pretaj kapti la kortuŝan scenon. Kaj sur la foraj montoj miloj kaj dek miloj da rigardantoj kun kapo

levita atendis la momenton por lanĉo.

Je duono post la 21-a laŭ la pekina tempo, en la regadejo iu laboranto premis la butonon por raket-ekbruligo. Je tiu momento la giganta raketo leviĝis rekte al la ĉielo, la bruego skuis la tutan valon kaj la oranĝe ruĝa flamo ŝprucinta el la vosto de la raketo ruĝigis la ĉielon.

Post dudek minutoj, de diversaj observejoj de la Xi'an-a mezur-rega centro kaj de la mezurŝipo "Yuanwang" sur la Pacifiko ĉe la ekvatoro venis ĝojigaj informoj: la triŝtupa raketo "Changzheng" startas unuafoje kaj duafoje; la satelito kaj raketo disiĝas; kaj la raketo akurate eniras en la ovalan orbiton de la spaco. La satelito "Azio 1" estis sukcese lanĉita.

La satelito "Azio 1", kiu funkcios por 10 jaroj, estas telekomunika satelito speciale por Azio. Ĝi havas 24 transigilojn kun suda kaj norda ondofaskoj, fiksiĝas sur la loko super la ekvatoro je 105 gradoj de orienta longitudo kaj servas al pli ol 30 aziaj landoj kun 2.5 miliardoj da loĝantoj en sudorienta Azio, la Korea Duoninsulo kaj iuj regionoj de Ĉinio per a vangarda tekniko.

Ĉinio unuafoje entreprenis la lanĉon de komerca satelito kun plena sukceso, kio montris, ke Ĉinio eniris la internacian merkaton de spacaj teknikoj. Ĝis nun Ĉinio sukcese lanĉis 27 malsamtipajn satelitojn per la raketo-serio "Changzheng". Ĉinio kontaktigos pli vaste kun alilandaj klientoj kaj donos pli bonan servon tiuflanke. ■



**E**N la tutlanda kuneveno de rakontfilma verkado okazinta en februaro mi informigis, ke la afero de ĉinaj filmoj atingis rimarkindan sukceson en la pasintaj 10 jaroj. Tion konfirmis la distribuado kaj projekciado de filmoj. Nun en Ĉinio la nombro de filmoprojekciaj servoj atingis 170 mil, kun 500 000 laborantoj. Ĉiujare la totala sumo de rigard-fojoj estis 16 miliardoj. En 1989 la enspezo de la filma distribuado kaj projekciado superis du miliardojn da juanoj.

Nun Ĉinio ĉiujare produktas 140-150 rakontajn filmojn, sed antaŭ 10 jaroj ĝi produktis nur 50-60. Tiuj ĉi filmoj riĉigis la enhavon, pliigis la vastecon kaj profundecon de la vivo kaj prezentis la diversecon de formoj, stiloj kaj esprimmanieroj.

Antaŭ ĉio, oni akiris senprecedencan sukceson en kreado de filmoj pri gravaj historiaj eventoj kaj revoluciistoj de nia maljuna generacio. Aperis pluraj majstroverkoj, kiel "Leviĝo en Nanchang", kiu priskribas la naskiĝon de la Ĉina Popola Liberiga Armeo; "Xi'an-a Evento", kiu prezentas, kiel en la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito batalis patriotaj kuomintangaj generaloj kontraŭ Ĉiang Kajŝek, la ĉefo de Kuomintango, pasiva al la milito; "Sun Jatsen", kiu priskribas d-ron Sun Jatsen, brilan pioniron de la ĉina demokratia revolucio. Tiuj filmoj okupas gravan lokon en la historio de ĉinaj filmoj. La filmo "Granda Ceremonio de la Fondiĝo de la Nova Ĉinio" priskribas Maŭ Zedong kaj aliajn gravajn personojn, kiuj multe kontribuis al la fondiĝo, kaj montras vastajn scenojn pri la batalo inter la no-



Sceno el "Tintas Fonto"

**WEI RAN:**

## Ĉinaj filmoj en la pasintaj 10 jaroj

vaj kaj malnovaj fortoj. Oni kalkulis, ke sur la ekrano vidiĝas figuroj de 140 gravaj personoj de ambaŭ flankoj. La filmo harmonie kombinas penson, arton kaj aprecon en unu tuto kaj fariĝis la plej eminenta el la samspecaj filmoj. Por filmi ĝin oni elspezis milionojn da juanoj, sed nun oni jam enspezis 30 milionojn da juanoj sole el ĝia distribuado, kio starigis novan rekordon de la rakontaj filmoj tiurilate.

En tiu periodo aro da promesplenaj filmistoj, fronte al la reala vivo, verkis nemalmultajn eminentajn influajn filmojn. "Alloga Orkestro" estas unu el

ili. Priskribante la naskiĝon kaj travivaĵon de vilaĝa orkestro, ĝi montras la aspiron de la riĉigintaj kamparanoj al la spirita vivo. Ĝi estas verkita surbaze de realaĵo. Plurajn rolojn de la filmo ludis membroj de la orkestro. Alia reprezenta verko el tiuj filmoj estas "La Respubliko Neniam Forgesos", kiu prezentas la imponecon de iu ferstala kompanio en importado de kapitaloj kaj instalaĵoj, teknika reformado kaj konstruado de moderna entrepreno dum la jaroj de reformado kaj pordmalfermo. Ĝi figuris modernan entrepreniston multescian kaj kuragan kun liberigita penso.

En la pasintaj 10 jaroj naskiĝis multaj porinfanaj filmoj sanaj en ideologio kaj esprimriĉaj en stilo. "Miao Miao", "Tintas Fonto", "Mi Larmis Nur Tri Fojojn", "Tempo Plena de Songoj" kaj aliaj eminentaj filmoj estas multe ŝatataj de la geknaboj. En 1989 Ĉinio produktis 13 rakontajn filmojn por la geknaboj, el kiuj la filmoj "En Flora Aĝo", "Kompanio de Provizoraj Instruistoj" kaj "Knaboj-militkaptitoj" estas la plej eminentaj.

Surekranigi literaturajn figurojn multe ŝatatajn de la publiko estas ĉiam grava laboro de la ĉinaj filmistoj. En la lastaj 10 jaroj aperis filmoj-adaptaĵoj de famaj verkoj: "Kamelo Ŝjangzi" kaj "Novlumo" de Laŭ Ŝe, "La Ĉefa Historio de A-Q" de Lusin, "Meznokto" de Maŭ Dun, "Landlima Urbo" de Shen Congwen kaj "Frosta Nokto" de Bakin. La Pekina Filmstudio en la pasinta jaro finis la filmadon de la 8-parta "Songo en Ruĝa Buduaro" post 5-jara klopodado, tiel ke ili unuafoje surekranigis la faman ĉinan klasikan romanon



Sceno el "Granda Ceremonio de la Fondiĝo de la Nova Ĉinio"


Sceno el "Songó en Ruĝa Buduaro"



Sceno el "Alloga Orkestro"







Sceno el "Leúso"



Sceno el "La Jaro de Malbona Fortuno"



Sceno el "Ruğa Sorgo"

kun la sama titolo en formo de rakonto.

Nun aro da talentaj junuloj kaj mezaĝuloj laboras en la filmkomponista rondo. Jam formiĝis filmkomponista trupo el junuloj, mezaĝuloj kaj maljunuloj. Iuj el ili faris plurflankan esploradon en ekspluato de filmaj temoj kaj artaj esprimoj. La filmoj "Malnova Afero Sude de la Urbo" reĝisorita de Wu Yigong, "La Jaro de Malbona Fortuno" reĝisorita de Xie Fei, "Leŭso" reĝisorita de Chen Kaige, "Virino de Bona Familio" reĝisorita de Huang Jianzhong, "Unu kaj Ok" reĝisorita de Zhang Xuezhao, "Vespera Sonorado" reĝisorita de Wu Ziniu k.a. iagrade pliriĉigis la strukturon, formon, stilon, lingvon, arton kaj esprimon de filmoj kaj kontribuis por altigi la filman arton.


En la sama periodo ĉinaj artistoj kun alilandaj kolegoj filmis plurajn fame konatajn filmojn. "La Lasta Imperiestro", produktita de Ĉinio kaj Italio, gajnis sep Oskarajn Premiojn en 1987. La ĉinaj rakontaj filmoj "Malnova Puto", "Ruĝa Sorĝo", "Vespera Sonorado" kaj "La Jaro de Malbona Fortuno" estis premiitaj en la filmofestivaloj de Tokio kaj okcidenta Berlino, dank' al kio la monda publiko konas kaj alte taksas ĉinajn filmojn.

Ĉeestantoj de la tutlanda kunveno de rakontfilma verkado traktis ankaŭ erarojn pri verkado: Iuj filmistoj erare opinias, ke nur filmoj pri lukto kaj amo plaĉas al la rigardantoj kaj pliiĝas la enspezon, ke aperis iuj trivialaj verkoj, kiuj mallevis la kulturalan nivelon kaj arton de la filmoj.

La kunveno decidis, ke en 1990 Ĉinio produktos 100 rakontajn filmojn, t.e., je 36 malpli multe ol en 1989. Koncernaj departementoj opinias, ke kvankam la kvanto de rakontaj fil-



Sceno el "La Lasta Imperiestro"



Sceno el "Virino de Bona Familio"

moj pligrandiĝis en la lastaj jaroj, tamen ilia kvalito ne leviĝis. Oni deziras, ke en 1990 tiu fenomeno ŝanĝiĝu.

La kunveno decidis ankaŭ, ke de 1990 la filmoj, produktitaj de 16 ĉinaj filmstudioj kaj aliaj

landoj, Hongkongo kaj Taiwan, ne estos kalkulitaj kiel konsistiga parto de la normo. La praktiko dum la pasintaj jaroj montras, ke la kuna filmado utilas al la interŝanĝo de spertoj en filmkomponado kaj produktado. ■



# Filozofo rajdanta sur nigra bovo

de HOU JUELIANG

**D**UM la 500 jaroj de la 8-a jc. ĝis la 3-a jc. a.K. estis la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj de Militantaj Regnoj. Tiam Ĉinio ŝajne estis unuigita lando, regata de Zhou-

kortego, sed fakte la landon dividis lokaj militaristoj kaj regis ĥaoso. La popolo, suferanta de separatismo kaj milito, aspiris al landunuigo kaj paco. Kiel liberigi la landon de ĥaoso kaj doni al

ĝi la pacon? Tiam oni faris diversajn proponojn por administri la ŝtaton. Sekve de tio aperis diversskolaj filozofiaj doktrinoj, kiaj taoismo pledanta por "trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo", konfuceanismo pledanta por "humanisma politiko kaj etiketo" kaj legalizismo. Krome, estis ankaŭ skoloj de Mozio, de agronomoj, de *jin*-kaj *jang*-istoj, de politikaj strategiistoj, de logikistoj, de militaj strategiistoj kaj de ekletikuloj. Ĉiuj skoloj havis siajn reprezentantojn, kiuj fariĝis elstaraj pensuloj kaj filozofoj en la historio. Laŭzio, filozofo rajdanta sur nigra bovo, kiun ni konigos sube, ja estis fondinto de taoismo kaj unu el la plej fruaj filozofoj de Ĉinio.

La datoj de liaj naskiĝo kaj morto nun estas nekonataj. Li, samtempulo de Konfuceo, vivis antaŭ ĉ. 2500 jaroj kaj servis kiel malaltranga oficisto pri libroadministrado en Zhou-kortego. Li dediĉis sian tutan tempon al legado, ne zorgante pri profito kaj rango. Poste, konfirmita la kolapsiĝo de la dinastio, li rezignis la oficon kaj foriris okcidenten por ermitiĝo. Kiam li atingis Hangu-pasejon (nordoriente de la nuna urbo Lingbao, Henan-provinco), rajdante sur nigra bovo, estro de la garnizono kun ĝojo diris al li: "Via sinjora moŝto baldaŭ ermitiĝos. Bonvolu resti ĉe mi por tempe kaj verku por mi libron!" Vole nevole li restis tie kaj ver-



kis la klasikan libron de taoismo «Tao kaj Deo» kun 5000 ideogramoj. Fininte la verkadon Laŭzio daŭrigis sian vojaĝon okcidenten. Neniu sciis pri lia celloko. Li estis konata por la posteuloj kiel ermita sinjoro.

La lingvo de «Tao kaj Deo» estas lakona, mistera, profundsenca kaj malfacile komprenebla. Ĝi estas filozofiaĵo malfacile trovebla, elspiranta la temperamenton kaj filozofian inteligentecon de la aŭtoro. En «Tao kaj Deo» Laŭzio fondis sian propran filozofian sistemon, kiu markis, ke la antikva filozofio de Ĉinio iris de rudimenteco en maturecon.

Li ne kredis je dioj kaj fantomoj, nek je la volo de la ĉielo. Li neis, ke la mondo kaj homoj estis kreitaj de la Dio. Li havis sian propran mondkoncepton kaj elmetis sian teorion pri la formiĝo kaj evoluo de la universo. Laŭ li la plej supera filozofia kategorio estas “tao”, kiu plej ofte signifas la konceptan originon, kaj iam la ĝeneralan leĝon de disvolviĝo de la aferoj. Li diris, ke “tao” ekzistas ĉie kaj ĉiam nekatenite de la tempo kaj spaco. Ĝi naskiĝis antaŭ la ĉielo kaj tero kaj eterne ekzistas, senforma, nevidebla kaj netuŝebla, tamen ĝi moviĝas senĉese. Pro sia senĉesa movado “tao” naskis ĥaoson. Jen kial li diris, ke “tao naskis unuon”. La ŝanĝiĝo interne de la ĥaoso estigis “*jin-an ĉi-on*” kaj “*jang-an ĉi-on*”. Jen “la unuo naskis duon”. Dank’ al la funkciado de la menciitaj ĉi-oj naskiĝis la ĉielo, tero kaj homo. Jen “la duo naskis trion”. La ĉielo, tero kaj homo estas eksterordinaraj fortoj kaj povas krei ĉion en la universo. Jen “la trio kreis ĉion”. Kaj tiamaniere formiĝis la granda universo. En la tempo de Laŭzio pluraj filozofoj opiniis, ke la dio kreis la materian universon. Tamen Laŭzio, kiu ne papage imititis aliajn, elmetis sian propran teorion, dirante, ke la universo estas kreaĵo de “tao”. En la longa historio, en kiu la homoj esploro-

ras la misterojn de la universo, Laŭzio trovis la naskiĝon, disvolviĝon kaj ŝanĝiĝon de aferoj, kaj perceptis la ekziston de ĝenerala natura leĝo, kiu regas ilin, sed, ne povante ĝin klarigi, li nomis ĝin “tao”.

Laŭ Laŭzio la batalo inter la kontraŭaj flankoj interne de la afero kaŭzas ĝian movadon. Li rigardis la aferojn moviĝantaj, sed ne stagnantaj. Jen lia primitiva dialektiko. Li diris la faman sentencon: “Fortuno kuŝas en misfortuno, kaj misfortuno kaŝiĝas en fortuno”, alivorte, bono kaj malbono povas transformiĝi unu en la alian, bono kaj malbono ne estas absolutaj, ili povas transformiĝi unu en la alian sub certaj kondiĉoj. Tial oni ne devas esti pesimisma, trafite de malfeliĉo, nek tro optimisma akompanate de feliĉo. La vortoj de Laŭzio tuŝas la koron de ĉiuj, kiuj legas ilin, pensante, ke ekstrema feliĉo naskos malĝojon, kaj post suferado venos feliĉo. Leginte la vortojn de Laŭzio feliĉulo povas sin deteni, kaj malfeliĉulo povas sin liberigi de malĝojo, ĉar plago kaj fortuno povas transformiĝi unu en la alian, same stas la malĝojo kaj ĝojo. Laŭzio estis eminenta pro tio, ke li vidis, ke aferoj povas transformiĝi en la kontraŭa direkto. Tio ankaŭ estas elita parto el liaj filozofiaj pensoj. Tamen estas menciinde, ke li neglektis la necesajn kondiĉojn en la kontraŭdiroj kaj transformiĝo, nek rigardis la transformiĝon de aferoj en la kontraŭa direkto disvolviĝanta, sed male, li rigardis tion rotacianta.

La verko «Tao kaj Deo» estas plena de dialektikaj sentencoj. Jen kelkajn bukedojn al vianiaj karaj legantoj: “Honestaj vortoj estas ne belaj, kaj belaj vortoj ne honestaj”, “Talentulo ne saĝumas, kaj saĝumantoj ne talentas”, “Erudiciulo ne babilas, kaj babilemulo ne erudicias”, “Facila promeso perdigas la kredon”, “La popolanoj ne timas morton, kial do timigi ilin

per mortigo?”, “Giganta arbo kreskas de delikata semo”, “Altega turo leviĝas sur ter-amaso”, kaj “Longa vojaĝo startas sub la piedoj”.

Laŭzio simpatiis kun la popolo kaj montris, ke la popolo malŝatas pro troa impostado de la regantoj. Li malamis la regantojn, kiuj “sin vestas per belegaj kostumoj, portas kun si akrajn glavojn, satigas sin per delikataj manĝaĵoj, kaj havigas al si abundon da mono kaj trezoro per ekspluatado kaj subpremado”. Li insultis ilin kiel ĉefrabistojn. Vizaĝe al la malluma kaj tumulta realaĵo, al la senlima avido kaj subpremado de la regantoj, kaj al la indignoplena popolo, Laŭzio ellaboris sian planon por la ŝtata administrado, t.e. “trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo”.

Filozofie Laŭzio opiniis, ke “tao observas la leĝojn de la naturo”. Li emfazis, ke oni respektu la objektivajn leĝojn de la natura disvolviĝo kaj ne malobservu ilin. Surbaze de tia filozofia penso, li proponis, ke ankaŭ la sociaj problemoj solviĝu nature kaj libere, laŭ la tendenco de la natura disvolviĝo, kaj tiucele nenia artefarita sistemo estas necesa. Li opiniis, ke sen “favoro” de la ĉielo kaj tero la estaĵoj kreskas nature, kaj sen “favoro” de la sanktuloj la popolo vivas libere, tial ĉio estu laŭ si, sen subjektiva funkciigo, kaj oni ne devigu la popolon fari tion nek malpermesu ilin fari alion — jen la tiel nomata “naturalismo kaj sen devigo” de Laŭzio. Li diris figure: “La regado de granda lando estas samkiel kuirado de fiŝetoj.” Por bone kuiri la fiŝojn oni ne devas kirli ilin senbezono, alie la fiŝoj misformiĝos kaj la kuirado tute fuŝiĝos. La principo pri administrado de ŝtato estas ja sama, oni ne devas fari kaprican “kirladon”. Per la filozofia doktrino “naturalismo kaj sen devigo” li kontraŭstaris al la “ambicia” praktikado fare de la tiamaj regantoj. La doktri-



no "trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo" fakte celas kontraŭstari al la "ambicia" regado de la regantoj. Laŭzio opiniis, ke la unua estas "ĉiela principo" observanta la naturajn leĝojn, dum "ambicia regado" de la regantoj kontraŭ la naturaj leĝoj estas "homa principo". Li atribuis ĉion, kion li opiniis racia, al la "ĉiela principo"; kaj ĉion, kion li opiniis malprava, al la "homa principo". Li opiniis, ke senigi riĉulojn je posedaĵoj por helpi malriĉulojn estas "ĉiela principo", kaj senigi malriĉulojn je posedaĵoj por nutri riĉulojn estas "homa principo". Evidente Laŭzio oponis per la "ĉiela principo" al la "homa principo". Fakte, li staris kontraŭ la ekspluatado kaj subpremado.

Samtempe kun pledado por "trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo", Laŭzio pledis ankaŭ por "forigo de sanktuloj kaj inteligenteco". Li opiniis, ke la sanktuloj kondutas kontraŭ la naturaj leĝoj, kaj malhelpas normalan vivon de la homoj kaj sanan disvolviĝon de la aferoj, ne ludante pozitivan rolon en la socia disvolviĝo. Pro tio li oponis kontraŭ la sanktuloj. Rilate al la scioj kaj inteligenteco, li opiniis ilin ankaŭ malbonaĵoj, kiuj malkvietigas la socion. Li diris, ke la kaŭzo de malfacila regado super la popolo kuŝas en tio, ke la popolo havas sciojn. Kiel ekzistas reciproka superruzo kaj intrigo inter homoj? Ĉar la popolo havas inteligentecon. Al la inteligenteca popolo li propagandis ian obskurantismon, asertante, ke estus pli bone por la homoj, ke ili ĉiam restus malkleraj, stultaj kaj nenionkomprenaj, ĝuste kiel bebo en lulilo.

Laŭ Laŭzio, se la popolo ne havus inteligentecon, nek aspiro, la regantoj estus indiferentaj kaj ne ambiciaj, la mondo do estus en paco, kaj fine ideala socio formiĝus. Kia do estas lia ideala socio? Laŭzio faris fabelecan priskribon pri ĝi. En tia so-

cio, la lando estos malgranda, la popolo malgrandnombra, multaj riĉaĵoj estos neuzataj, la popolo ne ŝatos transloĝiĝi nek vojaĝi foren, tial ĉaroj kaj ŝipoj restos neveturigataj, ĉiuj forte amos la pacon kaj pro tio kiraso kaj armiloj ripozos en tenejo. Oni ne lernos, nek uzos ideogramojn; oni faros registrojn per ŝnurnodado. Tia neinteligenta kaj senaspira popolo vivos feliĉan vivon, kontenta pri sia manĝo, vesto, loĝado kaj vivmaniero. Ili feliĉe vivos, izolite de la ekstera mondo: "Najbaraj landoj povos reciproke sin vidi, kaj aŭdi kokerikojn kaj bojojn unu el alia, sed iliaj popolanoj faros nenian kontakton inter si ĝis la morto." Tio signifas, ke Laŭzio volis returni la homan socion al la primitiva de malgranda lando kun malmultaj loĝantoj.

Pledanta por "trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo" kaj aspiranta "malgrandan landon kun malgrandnombraj loĝantoj", Laŭzio ne ŝatis Konfuceon, kiu ĉiam distrumpetis feŭdisman hierarkion. Iun tagon Konfuceo, vojaĝinte longan vojon, venis al li por konsulti pri la etiketo. Tiu ĉi estis tre indiferenta, ne respondis rekte, sed mokis lin. Li diris: "S-ro Konfuceo, la de vi adorataj antikvaj sanktuloj jam forlasis la mondon. Iliaj ostoj putriĝis. Restis nur iliaj vortoj. Por nen-

io nun ili taŭgas. Laŭ mi, estas pli bone, ke vi forigu vian fierecon kaj la troan deziron, malpliigu viajn ĝojn, indignon kaj malĝojn, forjetu viajn nereajlajn revon kaj idealon. He! Via aspiro tute ne utilas al vi mem. Ĉu vi demandis min pri etiketo? Jen mia respondo." La vortoj de Laŭzio malplaĉis al Konfuceo kaj malesperigis lin. Konfuceo diris al siaj disĉiploj: "Oni povas kapti beston per reto, fiŝon per logaĵo, birdon per sago, ĉiujn tiujn ni povas subigi, escepte de drako fluganta per nubo. Ĉu Laŭzio, kiun mi vizitis hodiaŭ, ne estas malfacile subigebla drako?" En la okuloj de Konfuceo Laŭzio estas nekomprenebla.

La doktrino de Laŭzio multe influis la ĉinan filozofion. La postaj materiistoj kaj ideistoj heredis lian penson de malsamaj vidpunktoj. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugalio	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

### Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

### Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Nova medicina kontribuo

de SUN GUOLIANG

**P**RO vira seksoperturbo disigis multaj geedzaj paroj, kiuj antaŭe profunde amis unu la alian. Ĉu ekzistas metodo solvi tiun problemon? "Ekzistas!" respondis fama ĉinmedicina kuracisto Zhang Daning, kiam mi lin intervjuis.

La 46-jara Zhang Daning estas vicestro de la Tianjin-a Ĉinmedicina Hospitalo, konsilanto de la Ĉina Ĉinmedicina Asocio kaj vicestro de la Ĉina Nefrologia Grupo. En kuracado de urogeneraj malsanoj kaj seksoperturbo kaj en

batalo kontraŭ kadukiĝo, li kreis novajn teoriojn kaj receptojn.

## BONA INFORMO POR LA UREMIO-SUFERANTOJ

Zhang Daning naskiĝis en familio de famaj kuracistoj de kvar generacioj. Lia praavo estis kuracisto de la kortega hospitalo de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.), preparis por imperiestro kaj liaj familianoj junigan medikamenton kaj estis multe laŭdata de la lastaj. Influate de la familio, Zhang Daning interesiĝis pri la ĉina medicino de sia infaneco. Li


siatempe legis parkere ĉinmedicinajn klasikaĵojn. En 1966, post kiam li diplomitiĝis en Tianjin-a Ĉinmedicina Instituto, li komencis sian kuracistan vivon, sin okupante ĉefe pri urogeneraj malsanoj.

Li konigis al mi, ke ĉinmedicinistoj opinias, ke la koro estas la plej grava, kaj ke la renoj ludas la duan gravan rolon, kaj strikte rilatas al la fizika forto, intelekto kaj vivlongeco de la homo. Nur kiam la koro kaj renoj estas en relativa ekvilibro kaj normala interrilato, la homo estas sana. Li elmetis teorion de kardi-nefreaksa sistemo, laŭ kiu li kuracis la renajn malsanojn.

Cia rena malsano, ĝenerale, fariĝas kronika rena prostracio kaj la renoj perdas ekskrecian funkcion, kio kaŭzas uremion. Ĝi estas rigardata kiel nekuracebla. En la okcidenta medicino, oni kuracas kronikan renan prostracion per transplantado de reno aŭ lavado de reno. Pro diversaj kaŭzoj transplantado de reno ne povas esti populare uzata en Ĉinio kaj la lavado de reno estas nur provizora metodo por eligi urinon per apartaj aparatoj, kiu ne povas radikale kuraci la malsanon.

Post multjara pena esplorado Zhang Daning elmetis ĝeneralan kuracan principon — "unue fortikigi la korpon kaj vigligi la sangon cirkuladon, due forigi malsekecon kaj normaligi urin-elfiltran funkcion de la renoj" kaj kreis 11 receptojn. Laŭ malsamaj periodoj kaj diferencaj simptomoj li pren-

Zhang Daning





as malsamajn receptojn, kaj tiel rebonigis la sanstaton de malsanuloj kaj longigis ilian vivon. Iuj malsanuloj komplete resaniĝis. Laŭ statistiko, la kurac-efiko atingas 90%, kaj la rimarkinda kurac-efiko (la simptomoj ĝenerale mildiĝis aŭ malaperis) estas 51.6%.

En oktobro 1988, kiam Zhang Daning laŭinvite vizitis Hongkong, iu sinjorino de riĉa komercisto vizitis lin por peti lian helpon. Ŝi suferis de uremio kaj vivis dank' al lavado de la renoj kaj transfuzo. Nur kelkajn semajnojn, post kiam ŝi ekprenis la medikamenton de la kuracisto, ĉiuj normoj de ŝiaj sango kaj urino multe pliboniĝis, ke ŝi ĉesis akcepti transfuzon kaj la lavado de la renoj malmultiĝis de tri fojoj ĝis unu fojo ĉiusemajne.

Xing Tianzheng, fama en Taiwan kiel "Montgrimpa Reĝo", venis al la ĉina kontinento por viziti siajn parencojn en sia maljuneco. La troa laciĝo estigis al li renan prostracion. Post kvarmonata kuracado de Zhang Daning, li resaniĝis kaj povas piediri du-tri horojn senhalte. Antaŭ la kuracado li ne povis fari paŝadon. Li kun memfido deklaris, ke li venos al la ĉina kontinento speciale por montgrimpadon.

## **MAGIA "OK-DIAGRAMA PILOLO"**

En 1987, Zhang Daning lekciiis en FR Germanio. Tiam germanaj ĵurnaloj rimarkige informis lian alvenon. Kiam li faris la sciencan lekcion, la kunvenejo plenis de aŭskultantoj. Liaj atingoj en kuracado de impotenteco ricevis laŭdon de eksterlandaj amikoj.

Doktoro Zhang konigis al mi, ke prevento kaj kuraco de vira impotenteco estas grava esplortemo de la medicinaj kolegoj de diversaj landoj. Ĝenerale, oni kuracas tiun malsanon per hormono aŭ psika induktado, tamen tio ne donas bonan efikon. En la ĉina medicino, oni kuracas tiun malsanon per medikamento refortikiga kaj tonika, kio ankaŭ ne ricevas bonan rezulton. Post esplorado de la riĉaj teorioj kaj spertoj de la

ĉina medicino en tiu flanko, li elmetis kuracprincipon "Preni la renon kiel la ĉefan kuracan objekton, kaj samtempe kuraci la hepaton, vigligi la sangcirkuladon por forigi kongeston, kaj kuraci la malsanon kaj fortikigi la kordon samtempe". Krome, li elfaris bonefikan "Ok-diagraman Pilolon" laŭ la heredita sekreta recepto de sia familio. La medikamento donas efikon de radikala fortikigo de homkorpo, ne celante portempan stimuladon. Laŭ la observado al 496 impotentecosuferantoj, kiuj prenis la medikamenton, la ĝenerala efiko atingis 91.9%, tiuj, kies simptomoj de la malsano malaperis aŭ fundamente malaperis, konsistigas 46.8%.

Paro da geedzoj en Tianjin profunde amas unu la alian. La edzo suferis de impotenteco, la edzino ĉie petis por kuraci la malsanon de sia edzo malgraŭ bankroto de la familio. Sed la edzo ne resaniĝis post plurjara kuracado. Fine ili venis al Zhang Daning por lasta provado. La edzino kun larmoj diris al la kuracisto: "Doktoro Zhang, mi adoras mian edzon, mi amas lin. Tamen, mi estas edzino, mi bezonas vere edzinan vivon. Se vi ne povos sukcese kuraci lian malsanon, mi povos fari nion krom eksedziniĝi disde li." Nelonge, post kiam la edzo prenis "Ok-diagraman Pilolon", malaperis la simptomoj de la malsano, la edzo resaniĝis. Evitiĝis eksedziĝa tragedio inter la paro.

## **SEKRETO DE ANTIMALJUNIĜO**

Antaŭ dek jaroj, en la urbo Tianjin Zhang Daning faris la specimenan enketon al mil pli-ol-65-jaraj maljunuloj. Li trovis, ke preskaŭ ĉiuj pli-ol-65-jaraj maljunuloj suferis de rena malfortikeco en malsamaj gradoj. Inter ili la maljunuloj, suferantaj serioze de rena malfortikeco, pli frue maljuniĝis, dume la maljunuloj, suferantaj malserioze de rena malfortikeco, malpli frue maljuniĝis. El ili estas 13 cent-jaraj maljunuloj, kiuj estis moderaj en seksumado en sia juna kaj meza

ago.

Post ekzamenado per okcidentamedicinaj kaj ĉinmedicinaj rimedoj al tiuj maljunuloj Zhang Daning trovis novan aspekton, ke ĉiuj maljunuloj suferas kaj de rena malfortikeco kaj de kongesto en malsamaj gradoj. "Rena malfortikeco kaj kongesto" estas grava patologia bazo de maljuniĝo kaj malsanoj de maljunuloj. Sekve li elmetis la teorion "Fortikigi renon kaj vigligi la sangcirkuladon" kaj elfaris antimaljuniĝan medikamenton "Forta Raŭpoherba Abel-reĝina Likvaĵo".

Iu maljuna pekinano antaŭe ofte anhelis post promenado en sia korto. Du jarojn post kiam li ekprenis "Forta Raŭpoherba Abel-reĝina Likvaĵo", li fariĝis energia kaj lia vizaĝo radias santon. Li ne nur povas promenadi senlace en sia korto, sed ankaŭ povas fari kuradon ekstere.

Zhang Daning diris al mi, ke post sia longtempa klinika praktiko li resumis la spertojn de antaŭuloj pri longa vivo kiel jene: "Sin tenu en sereneco, sen ambicio; havu ŝaton, sed ne sin dronu en ĝi; sin bridigu en seksumo; dormu sufiĉe, kaj helpe de medikamenta kapkuseno; faru modere sporton kaj ne tro; manĝu modere kaj ne manĝu nur ŝatatajn; portu pli lozajn vestojn kaj vestu vin ne tro varme, nek malvarme; loĝu en kvietaj loko kun sufiĉe da sunlumo; havu al vi korpoekzamenon ofte por kuraci malsanon, kiam ĝi estas ankoraŭ neserioza; ne prenu medikamentojn sendistinge." Ili vaste cirkulas inter la popolanoj.

Je la fino de mia intervjuo, Zhang Daning diris al mi, ke en 1989 li fondis en Aomen la Konsultiĝan Centron de Zhang Daning kaj ĉiujare li laboras tie en difinita tempo, ke ĉijare li fondis en Taiwan la kontaktan centron por servi al pli multe da pacientoj. Li aldonis, ke forigi doloron de pacientoj estas lia devo kaj li volas fari pli multe da kontribuo al la homaro. ■

# Kuna partopreno en ŝtataj aferoj

de SUN GUOLIANG

**Ĉ**INIO estas lando mastrumata de la popolo mem. La popolaj reprezentantoj kaj membroj de politikaj interkonsiliĝaj konferencoj prezentas la rimarkigojn kaj dezirojn de la popolo al la registaroj de malsamaj niveloj kaj tiamaniere helpas ilin en plibonigo de la laboro. La Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kiuj okazas foje ĉiujare, bone spegulas la politikan demokration de Ĉinio. En la kunvenoj la ĉeestantoj el malsamaj laborpostenoj parolas senĝene, pere de rezolucio, propono kaj kritiko, libere esprimas sin, konsciencplenumas la rajtojn, donitajn de la popolo kaj konstitucio, kaj prezentas siajn kritikojn kaj proponojn al la laboro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina registaro. Kiel raportisto, mi partoprenis en la Triaj Sesioj de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso kaj la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco okazintaj en marto kaj aprilo ĉi-jare.

## VARMA DISKUTO PRI LEĜDONO KAJ LEĜREVIZIO

Leĝdono kaj leĝrevizio estas multe diskutataj en ĉiuj popolaj kongresoj kaj politikaj interkonsiliĝaj konferencoj. La ĉi-foja sesio decidis prezenti sume 80 proponojn al la specialaj komisionoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso. Inter ili 38 estis prezentitaj al la Komisiono pri Leĝaj Aferoj de Ĉinio por elabori "Leĝo de Kontrolado" kaj "Leĝo de Ordenado" kaj revizii iujn artikolojn de la konstitucio kaj kriminalaj leĝoj. La Dua Sesio de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso en 1989 decidis prezenti 74 proponojn al la koncernaj specialaj komisionoj. El ili duono koncernis leĝon.

Wang Gong, popola reprezentanto el Anhui-provinco, kun granda ĝojo diris, ke la proponoj pri ellaboro de "Advokata Leĝo", "Leĝo de Limigo de Produktado kaj Vendado de Tabako", "Kontrolo de Popola Kongreso" kaj "Leĝo de Privataj Entreprenoj", prezentitaj de li en la Unua kaj Dua Sesioj de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso, estas adoptitaj kaj la leĝoj ellaborataj.

## REKTA KRITIKO AL LA LABORO DE LA PARTIO KAJ ŜTATO

Popolaj reprezentantoj kaj membroj de la popola politika interkonsiliĝa konferenco senrezerve prezentas siajn proponojn kaj kritikojn pri la laboro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la registaro, kio ludas gravan rolon por plibonigi la laboron de la Partio kaj registaro kaj protekti ilian prestiĝon en la okuloj de la popolo.

En la kongreso kaj konferenco oni proponis pli ol 80 esencajn reviziojn pri la raporto pri la laboro de la ĉina registaro farita de la ĉina ĉefministro. Ĉiuj tiuj proponoj estis akceptitaj.

En la Duaj Sesioj de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso kaj la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco okazigitaj marte de 1989, He Junhua kaj aliaj 31 ĉeestantoj diris, ke la popolo tre malkontentas, ke gefiloj de iuj gvidantoj de la Partio kaj ŝtato, profitante de la prestiĝo kaj potenco de siaj gepatroj, malversacias el negocon. Ili proponis al la Centra Komitato de la Partio kaj registaro malpermesi al la gefiloj fari negocon. Surbaze de la fakto, ke iuj departementoj konkure importis personaŭtojn per fremda valuto, membroj de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco proponis, ke la gvidantoj de la Centra



Komitato de la partio uzu personaŭtojn produktitajn de Ĉinio mem. Pro la malkontento kontraŭ privilegio ĝuata de iuj gvidantoj, oni proponis nuligi specialan provizon por la altrangaj oficistoj.

La supre diritaj proponoj estis akceptitaj de la Centra Komitato de la partio kaj la Ŝtata Konsilantaro. Julie de la jaro, la Centra Komitato de la partio kaj la Ŝtata Konsilantaro faris decidon: Severe malpermesi importi personaŭtojn; la membroj de la Politika Buroo kaj la Sekretariato de la Centra Komitato de la partio kaj partoprenantoj de la Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro senrezerve disponas ekskluzive aŭtojn produktitajn de Ĉinio mem; nuligi la specialan provizon de iuj manĝaĵoj por gvidantoj; kaj rezolute malpermesi al la gefiloj de altrangaj oficistoj kaj iliaj edz(in)oj fari negocon. Unu monaton poste, oni komencis severe plenumi la decidon.

## POR PLIBONIGI EKONOMIAN KONSTRUADON

Ĉiuj reprezentantoj kaj membroj zorgas pri ekonomia konstruado. En ĉiu kongreso aŭ konferenco ili prezentas multe da proponoj kaj kritikoj pri ekonomia konstruado, kion alte taksas la registaro kaj koncernaj departementoj.

En la lasta marto, kiam okazis la kongreso kaj konferenco, oni diris, ke la tarifo de akvovoja transporto estas kompare malalta, pro kio la koncernaj entreprenoj havas deficiton kaj simple ne povas daŭrigi la laboron. Ili proponis reĝustigi la





Kongreso



Al la kongresejo

tarifon. Laŭ la postulo de la Ŝtata Konsilantaro, la Ministerio de Trafiko kaj Ŝtata Buroo de Prezroj plurfoje faris esploron, starigis projekton por raciigi la tarifon kaj ekpraktikis ĝin la 3-an de septembro 1989. Tio ludas gravan rolon por kovri deficiton kaj akceli pasaĝer-transportadon sur la akva vojo.

En la kunveno Wang Deli kaj aliaj 30 reprezentantoj proponis alpreni necesajn rimedojn por elturni agrikulturan produktadon el stagnado. En la raporto pri la laboro de la registaro farita en la tria sesio de la kongreso agrikulturo estas metita sur la unuan lokon en la disvolviĝo de la ĉina ekonomio.

Wang Fuzhong, membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, diris al mi, ke en la pasintaj jaroj la komitato serioze traktis grandajn konstruojn de Ĉinio, aranĝis siajn membrojn fari esploron kaj enketon kaj faris proponojn, kio estas utila al la registaro, en la scienca kaj demokratia decido pri gravaj konstruaĵoj. Tion bone ekzemplis la fakto, ke la Ekonomia Komisiono de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco organizis fakan grupon pri konstruado de la akvobaraĵo ĉe la Tri Gorgoj de Yangzrivero, por partopreni en diskutado pri avantaĝo kaj malavantaĝo de la granda digo konstruota ĉe la Tri Gorgoj.

## EDUKADO, KULTURO KAJ PUBLIKA SANO ĜENERALE ZORGATAJ

En la kongreso kaj konferenco okazintaj en la lasta jaro oni prezentis 71 rezoluciojn kaj 581 proponojn (ekskluzive de pli ol 3000 sugestoj), koncerne edukadon, kulturon kaj publikan sanon. Nun oni donis kontentigajn respondojn al ili.

Oni proponis alpreni urgajn rimedojn por solvi la problemojn pri nesufiĉeco de mono por la baza edukado kaj malalta salajro de instruistoj. Nelonge poste, laŭ la postulo de la Ŝtata Konsilantaro la Eduka Komisiono kaj koncernaj departementoj de Ĉinio organizis kontrolan grupon kaj inspektis element- kaj mez-lernejojn de 25 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj pri iliaj edukaj rimedoj, salajro de instruistoj kaj lernoĉeso de lernantoj. Samtempe kun tio la registaro asignis pli da mono al la eduka afero, ekokupigis pri ellaboro de leĝoj kaj kodoj por levi la socian pozicion de instruistoj kaj ilian salajron. La ŝtato prenos la solvon de la edukaj problemoj kiel unu el la gravaj enhavoj por ekzameni la laboron de la lokaj registaroj kaj iliaj ĉefaj gvidantoj.

## KOLEKTADO DE OPINIOJ DE POPOLANOJ

En ĉiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj, urboj kaj gubernioj de Ĉinio funkcias organizaĵoj de popola kongreso kaj politika interkonsiliĝa konferenco. Ĉiuj iliaj membroj estas pretaj aŭskulti la publikajn opiniojn pri la laboro de la registaro kaj senprokraste prezentas ilin al la registaroj de koncernaj lokoj.

Pro riĉa rikolto de grenoj en la

sinsekvaj jaroj de post 1985, koncernaj departementoj de Shanxi-provinco malstreĉis sian atenton al agrikulturo. Tio malentuziasmigis la kamparanojn en kulturado de grenoj. La politika interkonsiliĝa konferenco de la provinco organizis laborgrupon, kiu en pluraj monatoj faris detalan enketon pri la problemoj kaj donis raporton al la provinca registaro. La registaro tre baldaŭ alprenis rimedojn kaj solvis la problemon.

Mi informiĝis de popola reprezentanto el Tianjin, ke en interparolo inter la urbestro kaj gvidantoj de koncernaj departementoj unuflanke kaj reprezentantoj de la urba popola kongreso aliflanke, iu instruistino rekte demandis: "En multaj familioj mankas gaso. Tio ege maloportunigas la vivon de la popolo. Kiam oni garantios la normalan liveron de gaso?" La demando embarasis la estron de la Publiktila Buroo de la urbo. Li citis ciferojn unu post alia kaj elmetis multajn malfacilaĵojn. La urbestro kun serioza mieno diris al li: "Respondu, kiam do vi solvos la problemon, sed ne donu al mi amasegon da ciferoj! La urbanoj zorgas nur, kiam vi povas garantii la gason!" Li laŭtigis sian voĉon: "Nome de la magistrato mi faras memkritikon. Ni ne bone plenumis nian devon. Mi garantios al la urbanoj, ke la problemoj estos solvitaj en mallonga tempo, alie ĉiuj gvidantoj de la koncernaj departementoj estos eksigitaj!" Post mallonga tempo la problemoj solviĝis. ■

## ESP-NOVAĴOJ

● Lastatempe la Ĉina E-Eldonejo eldonis 4 novajn librojn: “Ĉina Antologio (1949-1979)”, “Geedzigaj Moroj de



Novaj libroj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ĉinaj Nacimalplimulto”, “Pekinaj Vidindaĵoj” kaj “Esperanto-kurso por Memlernado (2)”. “Ĉina Antologio” enhavas 42 literaturaĵojn, inkluzive de noveloj, prozoj, raporto kaj poemoj, verkitajn de 39 modernaj ĉinaj verkistoj. “Geedzigaj Moroj de Ĉinaj Nacimalplimulto” prezentas la morojn pri amo kaj geedziĝo de la gejunuloj de 19 ĉinaj nacimalplimulto. “Pekinaj Vidindaĵoj” per koloraj fotoj konigas la historiajn vidindejojn kaj naturajn pejzaĝojn de 13 lokoj de Pekino.



La poŝtkarto kaj stampo por la 78-a datreveno de la naskiĝo de Verda Majo

● Memore al la 78-a datreveno de la naskiĝo de Verda Majo, internaciisma batalantino, la Poŝttelekomunika Buroo de Changshu, Jiangsu-provinco kaj tiu de Jiangmen, Guangdong-provinco, faris

memorajn stampilojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo respektive kaj uzis ilin la 7-an de marto. La Poŝttelekomunika Buroo de Jiangmen emisiis ankaŭ memoran poŝtkarton. Zhang Linrui kaj Xie Shaoxing estas iliaj projektintoj.

Memore al la 80-a datreveno de la Internacia Virina Tago (la 8-a de Marto), la Changshu-a Poŝttelekomunika Buroo faris memoran stampilon en Esperanto kaj la ĉina lingvo. Ĝia projektinto estas Zhang Linrui.


● En sia lastatempa landa kongreso Aŭstralia Esperanto-Asocio nomis s-ron Yosimi Umeda, la eksvicprezidanton, kiel sian honoran dumvivan membron pro liaj meritoj faritaj kaj ankoraŭ farotaj por la Esperanto-movado precipe en Azio kaj Pacifiko.

● La Kultura Centro de Montpellier organizos ĉi-jare du Internaciajn Semajnojn de Esperanto. La unua okazos de la 25-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro en vilaĝeto de franca montaro Alpes; la dua okazos de la 15-a ĝis la 22-a de septembro en havenurbo Sete ĉe mediteranea marbordo. La KCM proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto kaj havos trinivelajn kursojn kaj inicon al pedagogio.

Alĝinformo: Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, Francio.

● De la 10-a ĝis 25-a de aŭgusto 1990 okazos Kultura Seminario por Esperantistoj ĉe la Oomoto-Centro en la urbo Kameoka, Japanio. Oomoto estas ŝintoa religia organizo, kiu longan tempon subtenadas la studojn de la japanaj tradiciaj artoj, inkluzive de teceremonio, kaligrafio, ceramika arto

S-ino Marta Solis donas vortojn.



ktp.

● En la urbo Venado Tuerto, Argentino, la 29-an de januaro, 1990, okazis la fermo de intensiva kurso du-semajna. Al ĝi Marta Solis parolis pri Esperanto. La instruisto de la kurso estis Enrique Kohei.

### Funebre al Fu Mingdi, Ren Bosheng kaj Yang Kaiyuan

La 29-an de februaro, profesoro Fu Mingdi, honora membro de la konsilantaro de la Ĉina E-Ligo, forpasis pro malsano en Changsha en sia aĝo de 82 jaroj. En la 30-aj jaroj profesoro Fu okupiĝis pri redakto de “Lumo de Esperanto”, felietono de la revuo “La Mondo”, kaj fondis la Beiping-an E-Asocion. En la 60-aj jaroj li propagandis kaj disvastigis Esperanton en Wuhan, Changsha kaj aliaj ĉinaj urboj. Li funkciis kiel honora prezidanto de la Hunan-a E-Asocio kaj membro de la konsilantaro de ĈEL.

La 9-an de februaro, s-ro Ren Bosheng, honora membro de la konsilantaro de ĈEL forpasis en Kantono, en sia aĝo de 81 jaroj. S-ro Ren estis vicestro de la Guangdong-a Komisiono de Sciencoj kaj Tekniko kaj konstanta komitatano de la Guangdong-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En 1951, li, membro de la konsilantaro de ĈEL, funkciis kiel aganta ĝenerala sekretario. Komence de la 80-aj jaroj, li aktive laboris por fondi la Kantonan E-Asocion kaj estis elektita kiel ĝia prezidanto.

La 23-an de marto, s-ro Yang Kaiyuan, vicprezidanto de la Hunan-a E-Asocio, forpasis pro kancero en sia aĝo de 61 jaroj. S-ro Yang estis direktoro de la branĉo de la Internacia Turisma Servo de Ĉinio en Changsha kaj dekanato de la Turisma Fakultato de la Hunan-a Scienc-teknika Universitato. En la lastaj jaroj li aktive propagandis, disvastigis kaj praktikis Esperanton en la turista rondo, kaj tiamaniere faris grandan kontribuon al la kunigo de Esperanto kaj turismo.





Strato en Zhaotong

LAŬ LA SUDA SILKA VOJO ( 14 )

# *Zhaotong, urbo de facila trafiko*

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN



Bronza ujo el Han-dinastio



La kiosko kun steleo de Meng Xiaoju

**Z**HAOTONG en la ĉina lingvo signifas facilan trafikon. Ĝi situas sur altebenaĵo en nordorienta Yunnan kaj ĉe la limo de la provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan. Ĝi ĉiam estas trafika nodo inter Yunnan kaj centra Ĉinio kaj loko, kie komercistaj karavanoj intersanĝas varojn. Tamen pro divido de administraj regionoj kaj malproksimeco de fervojo Zhaotong iam estis malvigla en trafiko.

### ANTIKVA GUBERNIO ZHUTI

En historio Zhaotong estis la sidejo de la registaro de Zhuti-gubernio. Zhuti-monto en la loko abundas je arĝento de bona kvalito, tial "Zhuti" poste fariĝis nomo por altkvalita arĝento. Jam en la Orienta Han-dinastio (25-220) oni certaskale kolektis kaj fandis arĝenton en Zhuti kaj muldis arĝentaĵojn. Estis mono el Zhuti-

arĝento de Zhaotong inter la du specoj de arĝenta mono emisiita de la kortego kaj cirkulanta en la tuta lando. La kortego specifis, ke ĝi pli valoras ol la aliaj je 58%.

Zhaotong estis ankaŭ grava loko produktanta bronzaĵojn. Tia ujo similas al bovlo. Sur ĝia korpo estas kordaj desegnoj kaj sur ĝia fundo fiŝaj desegnoj kaj estas ankaŭ skriboj signifantaj bonan aŭguron kaj indikantaj la daton de la produktado. Plejparto de la bronzaĵoj elfositaj en Zhaotong estis popolaj vivbezonaĵoj, praktike uzablaj, neluksaj. Ili estas preskaŭ same grandaj. Siatempe ili estis pogranda produktitaj kaj cirkulantaj kiel komercaĵoj.

Zhaotong, grava urbo sur la Suda Silka Vojo, havas longan historion, kun abundo da kulturaj restaĵoj. Tie oni elterigis multajn gravuritajn steleojn, freskojn, brikojn kun bildoj kaj bronzaĵojn.

Kaj ne prifositaj estas pli ol mil tomboj antaŭ la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.), dividitaj en kvin grupojn. La elfositaj objektoj forme kaj stile portas karakterizojn de la kulturo de la han-oj en centra Ĉinio kaj lokan guston de la nacimalplimulta kulturo en sudokcidenta Ĉinio.

En la komenco de la kuranta jarcento en Bainijing, 5 km. sude de Zhaotong, estis elfosita steleo de Meng Xiaoju. En la Orienta Han-dinastio Meng estis unu el la ĉefaj familiaj nomoj en sudokcidenta Ĉinio. Homoj kun tia familia nomo havis potencon super vasta loĝantaro. En tiu dinastio en centra Ĉinio oni praktikis politikon transloĝigi homojn al landlimaj regionoj. Nemalmultaj hanoj venis sudokcidenten. Ili ne nur kunportis altnivelan teknikon de produktado, sed ankaŭ disvastigis tie la moron adori konfuceanismon. La steleo de Meng Xiaoju



notis tiun fakton por montri la disvastigon kaj influon de la kulturo de la han-oj en sudokcidenta Ĉinio. Sur ĝiaj flankoj estas gravuritaj drakoj, feniksoj kaj testudoj. Kun skribaĵoj en sigelgravura kaj oficiale skriba stiloj ĝi estas la plej antikva steleo kun pli ol cent ideografiaĵoj. Nun ĝi estas gardata, kaj por ordinaraj homoj estas malfacile propraokule vidi ĝin.

Flanke de la steleo de Meng Xiaoju troviĝas tombo kun murpentraĵoj de la Orienta Jindinastio (317-420). Oni prifosis la tombon kaj ne vidis ĉerkon nek skeleton, sed nur la ideografiaĵojn "Venu al la tombo la animo", kiuj montras, ke tio estas animveniga tombo. Ĝia mastro portis familian nomon Huo, ankaŭ kiu estis unu el la ĉefaj familiaj nomoj en sudokcidenta Ĉinio. Dum sia vivo li funkciis kiel guberniestro k.a. La tombo estis konstruita por venigi lian animon. La murpentraĵoj en la tombo estas tre valoraj historiaj restaĵoj. Ili konsistas el du partoj, la supra kaj la malsupra. La supra priskribas Taoismon kaj la malsupra spegulas la vivon de la tombomastro. La murpentraĵoj havas kolorojn ruĝan, flavan, brunan, nigran k.a. Iliaj stilo kaj arto estas krudaj kaj la figuroj misproportiaj. La sceno pri la vivo de antikvaj han-oj kaj ji-oj montrata en la pentraĵoj havas grandan valoron por esplori la rilaton inter Yunnan kaj centra Ĉinio kaj la originon de la ji-oj.

## MOROJ DE CENTRA ĈINIO

Zhaotong estas antikva agrikultura regiono. Jam antaŭ la Orienta Han-dinastio oni komencis fosi lagojn por irigacii rizkampojn. Nun en plejparto de la vilaĝoj de Zhaotong la agrikultura produktado ankoraŭ konservas tradician manieron. Eĉ en la urbo Zhaotong oni povas sperti fortan vilaĝan etoson. Kvankam vespere en Zhaotong estas malvarme, tamen sur stratoj disportigas bonodoro el budoj de kuiritaj batato kaj maizo kaj rostita riza pistaĵo. Troviĝas eĉ homoj, kiuj vendas legomplantidojn en la lumo de gaslampoj farita el boteleto. Ĝenerale, en


Yunnan tagmezo estas prospera tempo por komerco. Posttagmeze foiro malprosperiĝas iom post iom, kaj en vespero oni komercas ĉefe per agrikulturaĵoj. Tio tre similas al moro de la urbetoj en centra Ĉinio.

En la kamparo de Zhaotong nun ankoraŭ konserviĝas la moro "herboforigado en tamburado" iam furoranta en iuj lokoj de centra Ĉinio. Post printempa plugado oni ĉiam grupe iras al kampo por forigi herbaĉojn. La viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, kiuj staras en unu vico, kaj laboras kaj kantas akompanate de ritma tamburado. Ili tiel faras por mildigi la lacon, kaj iliaj kantoj estas tre gajgaj, ĉar ili temas pri aferoj bone konataj en la ĉiutaga vivo. Tiu moro havas alian avantaĝon, t.e. facile rimarkeblas maldiligentulo, ĉar ĉiuj kune laboras kaj samtempe moviĝas antaŭen.

Nemalmultaj moroj de centra Ĉinio jam eniĝis en la ĉiutagan vivon de la loĝantoj de sudokcidenta Ĉinio. Nun en Zhaotong ankoraŭ furoras la moro de entombigo iam populara en centra Ĉinio. En la antaŭurba vilaĝo Baipotang ni hazarde vidis funebran cere-


monion. Laŭdire, la dato de entombigo estas elektita de aŭguristo. En la tago de entombigo la parencoj de la mortinto portis blankajn vestojn. Oni portis ĉerkon el la domo, 16 viroj portantaj la ĉerkon trifoje iris kaj reiris sur la dorsoj de genuantoj, 8 junuloj, frapante tubojn, dancis freneze, kaj blindaj artistoj ludis *surnaon* (blovinstrumento). Antaŭ longa vico da funebrantoj kelkaj homoj alte tenis paperan flagon, paperan homfiguron (dio malfermanta vojjon) kaj paperan ĉevalon kaj iu tenis ruĝan tolan strion, sur kiu skribiĝas la nomoj de la parencoj de la mortinto. Kvankam ni ne komprenis ĉiun agon, tamen la solena funebrado montris, ke oni konsolis la animon de la mortinto, kaj samtempe esprimis, ke oni sopiras la vivon.

Jam fariĝis pasintaĵo la prospero kaŭzita de la Silka Vojo al Zhaotong, tamen neniam ĉesis la kreado de ĉiuj naciecoj de Zhaotong. Suririnte la altebenaĵon, ni rerigardis la grandan ebenan digon de Zhaotong. La loko silentis longan tempon, sed nun prezentas printempan pejzaĝon. ■






En teksejo de tapiŝo



Vazoj kun saŭco, fama produkto de Zhaotong


Etvendisto sur strato







Dalongdong-parko



● La Changli-a Limigita Kompanio de Ĉinio, la unua entrepreno kune investita de Ĉinio kaj alia lando en la urbo Changzhou, Jiangsu-provinco, antaŭ nelonge festis sian 5-an datrevenon de la fondiĝo. Kun elektronikaj konektiloj kaj ŝtopilingoj kiel siaj ĉefaj produktaĵoj, ĉiujare ĝi produktas 45000000 diversajn ŝtopilojn, ŝtopilingojn, ŝaltilojn, konektilojn de televidila anteno, konektilojn rondajn, rektangulajn, radiofrekvencajn kaj ondoportantajn, kaj konektilojn de koloraj kaj nigra-blankaj televidiloj, radioaparatoj, diktafonoj kaj lavmaŝinoj. I.a., la kurentfonta drato kun konektilo okupis la unuan lokon en la kvalituĝado de la samspecaj produktaĵoj de la lando en 1987, kaj enviciĝis inter la bonkvalitaj produktaĵoj de Jiangsu-provinco en 1988.


● Ĝis la fino de la kuranta jaro Ĉinio finkonstruos 71 gravajn ŝtatajn laboratoriojn, ĉiu kun investo de 6 milionoj da juanoj, kiom por la supermeza munt-nivelo de la mondo.

● Volframodiska argono-jona lasertubo, kiun laserologoj nomas kvara-generacia argono-jona laserproduktaĵo, estas sukcese elfarita kaj ekspertizita de la ŝtato en Nankino. Tiel Ĉinio fariĝis la dua lando post Usono, kiu povas produkti tian lasertubon.

● Tergloba horloĝo, kiu montras malsamajn tempojn de la 24 horzonoj de la mondo, estas sukcese elfarita de 70-jara Xu Dawei en Lingbao-gubernio, Henan-provinco. La preciza horloĝo estas facile uzbla.

● Antaŭ la ceremonio por ekbruligi la stafetkuran torĉon de "Lumo de la Azia Sportkunveno" okazonta ĉi-jare, oni flugigos 60 000-70 000 leterkolombojn sur Tian'anmen-placo en Pekino. Tio estos la unua fojo en la mondo, ke oni flugigos tiom da leterkolomboj kune.

Xu Dawei kaj lia tergloba horloĝo



Bakin (maldekstre) akceptas "Ordenon de la Popola Amikeco" en Ŝanhajo.

● Antaŭ nelonge la Prezidentaro de la Supera Soveto de USSR donacis "Ordenon de la Popola Amikeco" al la fama ĉina verkisto kaj esperantisto Bakin pro lia kontribuo por la kultura interŝanĝo inter Sovetunio kaj Ĉinio.

● Post kiam la fumabstinigilo Zhenya preparita el suko de natura planto gajnis oran medalon en la 37-a Eureka Foiro de Mondaj Inventoj en la fino de 1989, multaj fumantoj de Ĉinio kaj aliaj landoj ĉesigis fumadon helpe de ĝi.

● Nun kvin ĉinaj varoj havas grandan debiton en internacia markato. Ili estas birdkaĝoj, artefaritaj floroj, mielo, mantukoj kaj kotonaj litkovriloj.

● La historia dokumento de Dunhuang konservata en Leningrado, kiun ĉinaj fakuloj deziris vidi jam de kelkaj generacioj, estos ftopresita de la Ŝanhaja Eldonejo de Antikvaj Libroj, en dekseksfolia formato kaj el ĉ. 60 volumoj. Tio havos grandan influon sur la akademian rondojn en- kaj eksterlandajn.

● La bruna granda pando Dandan, la ununura en la mondo, antaŭ nelonge naskis samkoloran idon en la antikva urbo Xi'an de Ĉinio. La sukcesa generado de tia ido okazis neniam antaŭe en la mondo.



# Pri “CHILE-EBENAĴO”

de DI ZI

*Chile-ebenaĵo*

*Kuŝas ĉe Yin-monto.*

*La ĉielo kiel tendo*

*Pendas ĝis la horizonto.*

*Sub la ĉielblu' sen baro*

*La paŝtejo vastas kiel maro.*

*Kiam vent' klinas la herbojn,*


*Ekaperas bovoj kaj ŝafoj en aroj.*

Tio estas popolkanto de la periodo de la Nordaj Dinastioj (386-581 p.K.). Historia libro notas, ke la armeo de la Norda Qi-regno (550-577 p.K.) malvenkis en la batalo kontraŭ la Norda Zhou-regno. Por relevi la kuraĝon de la soldatoj, oni ordonis al Hultŭjin, membro de chile-tribo, kanti la kanton. Estas ankaŭ diro, ke la kanto estis pastoralo de chile-anoj. La teksto de la kanto, origine verkita en la xianbei-nacia lingvo, priskribas la vastan stepon kaj la vivon de nomadoj.


Chile-ebenaĵo situas sur stepo norde de la provinco Shanxi, kie vivis antikvaj chile-anoj. La stepo de Chile etendiĝas senlime ĝis la horizonto. La blua ĉielo volbiĝas super la vastega stepo. La vidaĵo sentigas drastan kontraston de la senlima kosmo kaj malgrandega homo. La lastaj versoj, “*kiam vent' klinas la herbojn, ekaperas bovoj kaj ŝafoj en aroj*”, donas al la dezerta stepo tuj vivecon per la saĝa priskribo: En vento kliniĝas la herboj, dum paŝtataro ekaperas el la herbaroj. La poemo, sen ajna postsigno de afekta polurado, profunde impresas pri superbeco de la senlima herbejo kaj estas rigardata kiel eterna majstraĵo.

Pere de linia konturo kaj akcenta kolorado de ĉina pentrarto, s-ro Sha Gengshi sukcese bildigis la naturan scenon: Sub la blua firmamento sterniĝas herbejo punktita de bovoj, ŝafoj, paŝtisto kaj maljunulo kantanta popolkanton. La bildo, prezentanta la harmonion de la naturo kaj la homoj, kun verda koloro kiel la baza tono, esprimas la vivecon de la vastega stepo.

La kaligrafiaĵo de s-ro Sha por la poemo “Chile-ebenaĵo” sin karakterizas per forteco, libereco, varieco kaj ĉarmo. ■



Kaligrafiaĵo de Sha Gengshi



敕勒歌



Pentrajo farita de Sha Gengshi por la poemo





# Esploristo en la lando de "Nigra Oro"

de DA WEI

**M**I havis feliĉon konatigi kun Wang Jingwu kaj interparolis kun li. Dank' al la interparolo, mi havis novan scion pri karbo.

Antaŭe mi sciis nur, ke karbo estas natura solida hejtaĵo. Aŭdinte lian parolon, mi eksciis, ke en fluida stato, karbo povas esti transportata per tubo kaj bruligata kiel oleo. Tamen en Ĉinio la esploro de tiu nova hejtaĵo, altdensa akvokarba hejtaĵo, havas nedisigblan rilaton kun li.

La 53-jara Wang Jingwu naskiĝis en Fushun, karba urbo en nordorienta Ĉinio. Li ŝerce diris al mi: "Eble ĝuste pro tio mi ne povas disigi de karbo."

Kun blanka vizaĝo li portis malnovan kaj puran Sun-Jatsenfasonan kostumon kaj paron da bluaj manikumoj. Laŭ la unua vido li tute ne aspektis kiel supera inĝeniero, sed elspiris modestecon kaj diligentecon de la ĉinaj intelektuloj.

En 1956, abiturientiĝinte, Wang Jingwu sukcesis en la ekzameno por studi en Sovetunio. Unue li lernis fundamentajn kursojn en la Moskva Minologia Instituto kaj poste studis en la fakultato de Minej-hidraŭlika Mekanizado en la Siberia Metalurgia Instituto. En junio 1961, li akiris la inĝenieran ateston per elstaraj sukcesoj. Reveninte en Ĉinion en la sama jaro, li instruis en la fakultato de mekanismo kaj elektroenergio de la Pekina Minologia Instituto kaj samtempe sin okupas pri la studo pri minhidraŭlika mekanizado dum 10 jaroj.

En 1971, Wang Jingwu eklaboris en la Pekina Karbindustriprojekta Institucio, post nelonge li ekfunkciis kiel vicĉefinĝeniero kaj respondecis pri projektaj scienc-esploro kaj normigado de la ĉina karbo-industrio. En tiuj jaroj, li frekventis enlandajn karbominejojn grandajn kaj malgrandajn.

En sia vizitado, li, inĝeniero atentema kaj cerbumema, ekpripensis pri la malfaciloj ekzistantaj dum longaj jaroj koncerne la karboindustrion de Ĉinio: Karbo superamasigas en multaj konservejoj de norda kaj okcidenta Ĉinio. Tie karbopulvoro ŝvebas en ventaj tagoj, nigra akvo fluas en pluvaj tagoj kaj nemalmultaj karbo-stakoj longe membrulas. Sed en suda kaj orienta Ĉinio, pro manko de karbo

multaj fabrikoj funkcias nur 3-4 tagojn semajne kaj estas malfacila ankaŭ la ĉiutaga vivo de la loĝantoj.

Wang Jingwu diris al mi: "Laŭ statistiko, en Ĉinio la karba rezervokvanto estas ĉ. 900 miliardoj da tunoj kaj la karba produktokvanto pliiĝis meznombro ĉiujare je 30-40 milionoj da tunoj. Pro tio, ke la karbominejoj plejparte troviĝas en norda kaj okcidenta Ĉinio, dum longa tempo Ĉinio devas transporti karbon de nordo al sudo kaj de okcidento al oriento. Kvankam la ĉina fervoja departemento donas ĉiujare 40% de siaj fortoj al la transporto de karbo, tamen tio ne povas kontentigi la bezonon."

Ĉu ekzistas nova karbo-transporta metodo? Wang Jingwu

Wang Jingwu en laboro





komencis sian serĉadon. Konsultinte grandan kvanton da dokumentoj, li trovis, ke la tuba karbotransportado en Usono estas imitinda. Wang Jingwu klarigis al mi, ke tio estas miksi proporcie la pulvorigitan karbon kun akvo, kaj transporti la miksaĵon per pumpilo laŭ tuboj al la konsumantoj, kiuj uzas ĝin post ĝia senakviĝo. Dank' al alprenado de tiu tekniko oni ŝparas monon kaj spacon, konstruas rapide kaj konsumas mal multe.

Konstatinte, ke la tuba karbotransportado ludos gravan rolon en la ĉina ekonomio, Wang Jingwu diligente studis tiuf flankan teorion kaj faris esploron en dekkelkaj provincoj en 2 jaroj, dank' al tio, li akiris grandan kvanton da materialoj. Li prezentis la eblecon de la tuba karbotransporto en Ĉinio en sia raporto "La alilanda tuba karbotransportado kaj supozo pri ĝia disvolviĝo en Ĉinio". La artikolo estis alte taksita de la Ŝtata Konsilantaro kaj aliaj departementoj. La Ŝtata Komisiono de Sciencoj kaj Tekniko prenis ĝin kiel unu el la ŝlosilaj scienc-teknikaj problemoj de la Sesa Kvin-jara Plano de Ĉinio (1981-1985). Wang Jingwu estis engaĝita kiel unu el la respondeculoj de la koncerna specialista grupo. Septembre de 1982, li prezentis por la unua fojo en Ĉinio esploran raporton pri praktikebleco de la prova industria tuba karbotransporto. Poste, li unusole aŭ kune kun aliaj kelkdekfoje faris raportojn pri praktikebleco de la tuba karbotransporto, produktado de la akvokarba miksaĵo kaj ĝia bruligo. Li faris projektajn kaj konstruajn desegnojn kaj starigis kelkajn malgrandajn ekzemplajn konstruojn.

En 1985, Wang Jingwu veturis al Usono por esplori la praktikeblecon de la tuba karbotransporto ĉe Yangzi-rivero. Kiam la tasko proksimiĝis al sia plenumiĝo, lia kapo ĉiam streĉita subite trankviliĝis. Li opiniis, ke ne estas praktika la konstruo de longdistanca tuba karbotransporto kaj nun, kiam mankas financoj al Ĉinio. Kvankam la akvokarba miksaĵo estas elfarita, ĝi, hejtajo de ordi-



Wang Jingwu (dekstre) esploras la brulon de akvokarba hejtajo

nara tipo, alportas al la konsumantoj iajn malfacilojn, ĉar ĝi devas anhidriĝi antaŭ la uzado. Li sciis, ke ĉiujare 30%-40% da petrolo estis forbruligita en la energiaj entreprenoj de Ĉinio. Se oni faros la forbruligotan petrolon kemiindustria materialo aŭ rekte eksportos ĝin, Ĉinio do pliigos sian enspezon je miliardoj da juanoj ĉiujare. Ĉu eblas fari pli bonan karbofluidaĵon? Post pripensado Wang Jingwu decidis fari novan esploron — novgeneracian altdensan akvokarban hejtajojn por anstataŭigi per ĝi petrolon.

Post pli ol unu jaro, finfine naskiĝis la altdensa akvokarba hejtajo konsistanta el karba pulvoro, akvo kaj aldonajo. Same kiel petrolo, ĝi estas fluida kaj stabila. Krom tuba transporto, oni povas ĝin transporti per cisterovagono kamiono. La tekniko de ĝiaj produktado, konservado, transportado kaj brulado nun jam atingis la nivelon de industria praktiko. Wang Jingwu emociite diris al mi, ke en Fushun de Liaoning-provinco, Zaozhuang de Shandong-provinco kaj aliaj lokoj oni starigis fabrikojn de la akvokarba hejtajo, kies produktaĵoj anstataŭ petrolo nun estas senĉese liverataj al malsamspecaj industriaj kaldronegoj kaj bakfornoj. La Unua Pekina Paper-fabriko kon-

sumis meznombre 22 mil tunojn da petrolo ĉiujare antaŭe, sed de 1986, kiam ĝi transformis sian 60-tunan kaldronegon funkciigatan de petrolo en tiun funkciigatan de la akvokarba hejtajo, ĝi ŝparas brulaĵan elspezon je 1.03 milionoj da juanoj ĉiujare. Oni ne povas kalkuli la profiton kreitan de la ŝparita oleo.

Je tio, Wang Jingwu prenis ĵurnalon, kaj diris al mi montrante iun artikolon sur ĝi: "En 1989, la Ŝtata Konsilantaro decidis envicigi la altdensan akvokarban hejtajojn en la tabelon de la gravaj produktaĵoj de la lando."

Mi informiĝis, ke Wang Jingwu estis honorita per la titolo "ĉina avangarda laboranto, 1989" kaj premiita kiel ĉina labormodelo de energia industrio pro siaj elstaraj kontribuoj al la tekniko de la akvokarba hejtajo. Kiam mi gratulis lin, li embarasite diris: "Mi estas nur reprezentanto. La sukcesoj apartenas ne al mi sola. Mi ŝuldas niajn sukcesojn unue al la ŝtato, kiu kreis por ni bonajn kondiĉojn kaj due al la komuna penado de la sciencistoj kaj teknikistoj de la 8 scienc-esploraj kaj konsumantaj unitoj." ■

NIA MONDO

# Moroj de Omano



Sur kamelo

Element-lernejanoj



Haveno





Eble pro la geografia pozicio, antaŭ longe Omano jam fariĝis komercejo frekventata de eŭropanoj, afrikanoj kaj hindoj. Navigistoj kaj komercistoj de Omano aktivadis en havenoj tra la mondo, kiam duono de la homoj de la mondo navigis per boatetoj faritaj el salikaj vergoj. Pro la imponaj kasteloj, belaj domoj, bonorda ŝtupara kamparo, vasta dezerto kaj ĉarma marbordo, Omano ĉiam altiras al si pli kaj pli multe da turistoj.

En Bedu la rivervaloj plenas de tendoj faritaj el lanoj de nigraj kaproj. La virinoj en nigra kaptuko, kirlas lakton, kolektas brullignojn aŭ nutras kaprojn. La lokanoj de sia infaneco malluksege vivas en dezerto. Ili trinkas alkalajn putakvon, kaj suferas sablan ventegon kaj sunbakadon. Tamen ili ĉiam ŝajnas viglaj. Ĉiutage, ĉe tagiĝo, ili vekis la kamelojn kaj komencas preĝi. Ili prenas bakitan panon kiel matenmanĝon kaj poste trinkas teon. Ilia teo estas dolĉa kaj nigra. Ili trinkas ankaŭ kafon, sed amaran.

Id estas la ĉefa festo de Omano. Tiutage oni salutas unu al la alia, ĝoje dancas en bela muziko, kaj la viroj prezentas spadan dancon.

Dum nupto omananoj portas belajn vestojn, kaj la novedzino portas orajn ornamatojn. En nupto okazanta en Mutrah oni ludas tradiciajn muzikilojn. Bahla estas ceramika centro. Eĉ la plej ordinaraj vivbezonaĵoj estas bele faritaj.



Argilaj-faristino



Nupto



# Ĉina ŝako (VII)

de RONG HUI

## TAKTIKOJ EN MEZA STADIO (2)

(4) **Forlaso de ŝakpeco.** En tio oni celas kompletan venkon per forlaso de unu aŭ kelkaj ŝakpecoj. Tiu taktiko en konvena uzado povas fari la ludon alloga kaj gustoplena. En la bildo 1, la ruĝa partio posedas superecon, sed ne povos akiri la venkon facile. Post multflanka pripensado la ruĝa partio movas sian ĉaron sur la 3-a linio antaŭen 3 paŝojn kaj kaptis la nigran elefanton, lasante la ĉaron kaptita de la nigra ĉevalo sur la 9-a linio. Kvankam la ruĝa partio perdis unu ĉaron, tamen ĝi povas movi la ĉevalon sur la 6-a linio antaŭen al la 7-a por fari mortigan atakon (La ruĝa ĉaro






sur la 6-a linio moviĝos unu paŝon antaŭen kaj ŝakigos la nigran ĉefgeneralon).

(5) **Reteno de ŝakpecoj de la rivalo.** Per malmultaj ŝakpecoj oni malebligas al iuj ŝakpecoj de la rivalo moviĝi libere, poste iom post iom pligrandigos sian superecon kaj faros lastan batalon je apero de ŝanco. Ekz. en la bildo 2, la du partioj havas egalan forton, sed post kiam la ruĝa kanono kaptas la nigran mezan soldaton, la nigra partio povas nur movi la gvardianon sur la 4-a linio antaŭen al la 5-a (Se ĝi movus la gvardianon sur la 6-a al la 5-a, ĝi troviĝus en pli malfavora stato). Poste la nigra ĉaro sur la 2-a linio devigite retiriĝas 7 paŝojn por defendi sian ĉefgeneralon, kaj tiam la ĉaro estas katenita. Tiutempe la ruĝa partio povas fari pluan atakon.

(6) **Blokado.** Tiu taktiko celas malgrandigi la movan spacon de iuj ŝakpecoj de la rivalo. Ekz. en la bildo 3, la ruĝa ĉaro sur la 6-a linio moviĝas antaŭen 7 paŝojn por blokadi la nigran ĉefgeneralon kaj sufoki la nigran kanonon. La nigra ĉaro sur la 7-a linio moviĝas unu paŝon an-

taŭen kaj kaptas la ruĝan ĉevalon. La ruĝa elefanto sur la 7-a linio moviĝas antaŭen al la 5-a, por ke la ruĝa kanono ataku la nigran ĉaron, kiu devas retiriĝi unu paŝon. La ruĝa ĉaro sur la 9-a linio moviĝas dekstren al la 6-a kiel oferdo, la nigra kanono sur la 4-a linio moviĝas 9 paŝojn antaŭen kaj kaptas la ruĝan ĉaron, la ruĝa ĉefgeneralo sur la 5-a linio moviĝas maldekstren al la 6-a kaj kaptas la kanonon. Tion sekvas mortiga ŝakigo al la nigra ĉefgeneralo.

(7) **Pinĉa atako.** La maldekstra kaj dekstra aloj faras kunan atakon al la rivalo, kio povas rapidigi la sukceson. Ekz. en la bildo 4, la ruĝa partio povas fari kunan atakon per ĉaro kaj kanono de ambaŭ aloj. Ekz., la kanono sur la 8-a linio moviĝas antaŭen 6 paŝojn por malhelpi la nigran ĉevalon eliri, la nigra ĉefgeneralo sur la 6-a linio moviĝas dekstren al la 5-a, la ruĝa ĉaro sur la 2-a linio moviĝas antaŭen 9 paŝojn kaj ŝakigas la ĉefgeneralon, la nigra ĉaro sur la 6-a linio retiriĝas 6 paŝojn por defendo, la ruĝa ĉaro sur la 2-a linio moviĝas maldekstren al la





3-a, la ruĝa kanono sur la 1-a linio povas moviĝi maldekstren al la 4-a kaj ataki la nigran ĉaron. Tiam la ruĝa partio ekhavas superecon.

(8) **Trarompo de defendo.** Dum atako oni ofte aplikas la taktikon trarompi la defendan linion de la rivalo. Ekz., oni aplikas la taktikon trarompi la defendon de la gvardianoj kaj elefantoj de la rivalo por malŝirmi kaj ataki la ĉefgeneralon. En la bildo 5, la ruĝaj ĉaro kaj kanono sur la 4-a kaj 3-a linioj estas retenataj de la nigra ĉaro, ankaŭ la ruĝa ĉevalo sur la 4-a linio ne povas moviĝi antaŭen

al la 3-a por ŝakigi la ĉefgeneralon. Ŝajne la ruĝa partio ne povas fari atakon, sed ĝi povas trarompi la defendan linion de la nigra partio per lerta movo. La ruĝa partio unue movas la kanonon sur la 3-a linio antaŭen 5 paŝojn kaj kaptas la nigran soldaton, la nigra ĉaro sur la 9-a linio dekstren al la 6-a kaj kaptas la ruĝan ĉaron, la ruĝa kanono sur la 7-a linio moviĝas antaŭen 5 paŝojn kaj kaptas la nigran elefanton, la nigra elefanto sur la 5-a linio retiriĝas al la 3-a kaj kaptas la ruĝan kanonon, la ruĝa ĉaro sur la 5-a linio moviĝas 2 paŝojn antaŭen

kaj kaptas la nigran gvardianon, la nigra gvardiano sur la 4-a linio moviĝas antaŭen al la 5-a kaj kaptas la ruĝan ĉaron. La ruĝa ĉevalo sur la 4-a linio moviĝas antaŭen al la 6-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, la nigra ĉefgeneralulo sur la 5-a linio moviĝas al la 4-a, la ruĝa kanono sur la 3-a linio moviĝas al la 6-a kaj faras mortigan ŝakigon. La rezulto montras, ke la ruĝa partio, kvankam perdis du ĉarojn, trarompis la defendan linion de la nigraj gvardianoj kaj elefantoj kaj akiris la finan venkon per "kanono post ĉevalo". ■

## POR KOMENCANTOJ

### Miskompreno

**S**U Li estas bela knabino, kaj ŝia amato Lin Hong admiris, ke ŝi estas pura kristala peco. Ili enamiĝis antaŭ du jaroj. Ili ĉagreniĝos, se ilia rendevuo interrompiĝos eĉ je unu tago.

Sed iun matenon kamaradino de Su Li informis ŝin, ke hieraŭ vespere ŝi vidis Lin Hong promenanta kun knabino brako en brako. La novaĵo maltrankviligis Su Li dum la tuta tago.

"Mi ne kredas," diris Su Li.

"Ankaŭ mi ne kredis, sed kiam mi proksimiĝis al ili, mi ne povis ne kredi."

Su Li ne havis la kuraĝon fronti rekte al la diro, nek volis kredi. "Mi baldaŭ informiĝos pri la vero."

Tiuvespere estis ilia regula rendevuo.

"Lin Hong, kien vi iris hieraŭ vespere post laboro?"

"Hejmen."

"Sed oni diris al mi, ke vi kunestis kun iu knabino. Ĉu vere?"



Su Li esperis aŭdi lian nean respondon.

"Ha, jes. Ŝi estis mia samlernejano, kaj ni hazarde renkontiĝis survoje."

Ho ĉielo, li neniom kaŝis kaj montris neniom da honto. Su Li diris, fikse rigardante lin:

"Kaj ŝi preme sin apogis sur vi..."

"Sed mi klarigu..." Lin Hong kaptis Su Li je la mano.

"Fi al vi!" ŝi forskuis lian manon kaj kuris al aŭtobusa haltejo.

Poste Lin Hong dufoje telefonis al Su Li, sed kiam ŝi rekonis lian voĉon, ŝi tuj remetis la aŭdilon, kvankam ŝi tre volis aŭdi lian voĉon.

Iun vesperon post kelke da ta-

goj bela junulino venis viziti Su Li.

"Mi estis samlernejano de Lin Hong. Li menciis vin al mi."

"Ĉu? Pro kio vi venis?" Su Li pririgardis la vizitanton.

La junulino sidiĝis kaj ekparolis senhaste:

"Tiu tagon mi estis faligita de biciklanto. Li forkuris kaj mi ne povis min starigi. Tiam venis sinjoro. Li helpis min starigi kaj eskortis min al hospitalo. Poste li akompanis min ĝis mia hejmo. Mi kaj mia edzo tre dankis lin. Kiel interese estas, ke li kaj mi kaj mia edzo estis samlernejanoj."

"Tiu sinjoro estis neniu alia ol Lin Hong. Du tagojn post la akcidento li vizitis min kaj fiere menciis sian amatinon. Mi promesis al li, ke post la resaniĝo mi vizitos la akrevidan junulinon, kiu konkeris lin. Li vere estas bravulo."

"Jes, li estas brava," Su Li diris al si. "Mi volas tuj vidi lin."

Kiam la gasto diris "ĝis-revidon", Su Li diris al ŝi ĉe ŝia orelo:

"Mi tre amas Lin Hong, kaj nun pli forte."

Su Li tuj eliris kaj baldaŭ malaperis en la nokto. ■

# Maljunulejo por alilandanoj en Ĉinio

Teksto de **HU YUN**

Fotoj de **LIU SIGONG**



Nova familio en la maljunulejo



Ŝi purigas sian ĉambron.

En amuzejo







La maljunulejo

**E**STAS ĉina popoldiro: “Falintaj folioj definitive venos al siaj radikoj.” Ĝi signifas, ke kien ajn oni migradas en la juneco, oni certe revenos al sia hejmloko en la maljuneco. Eble tio estas hejmspiro de ĉinoj.

Tian senton havas ne nur ĉinoj, sed ankaŭ ĉiuj homoj en la mondo. En 1986 iu japanino loĝanta en la Maljunulejo por Alilandaj Elmigrintoj en Harbin fine revenis en sian hejmlandon, kiun ŝi forlasis antaŭ jardekoj. Ŝi rimarkis, ke kvankam en Japanio ankoraŭ estas ŝiaj parencoj, tamen ne ekzistas ŝia hejmo. Ŝi certigis, ke ŝia hejmo estas en Ĉinio, en la Maljunulejo por Alilandaj Elmigrintoj en Harbin. Post 15 tagoj ŝi, spite ĉion, venis denove al sia hejmo en Ĉinio. Ŝi, nomata Kamei, aĝas 73 jarojn. Nun en la maljunulejo loĝas 12 tiaj maljunuloj.

La maljunulejo por alilandanoj estas unika en Ĉinio. Ĝi fondiĝis en 1954. En la pasintaj 35 jaroj tie vivis pli ol 1000 fremdlandaj maljunuloj, iuj el ili eĉ ĝis la lasta horo de sia vivo. Ili venis el Japanio, Koreio, Sovetunio,

Usono k.a. Pro milito kaj aliaj kaŭzoj ili restis en Ĉinio kaj vivis solece. Tamen la maljunulejo havigis al ili varman hejmon kaj feliĉigis ilin en ilia maljuneco.


La maljunulejo situas en strato ĉe la sudorienta fino de Harbin. En ĝia korto kreskas multaj floroj, herboj kaj arboj, ke ĝi similas al ĝardeno. La du-etaĝa blanka domo estas loĝejo kaj amuzejo. La medio estas kvietaj, la aero freŝa kaj la domo pura kaj hela. La ĉambroj, grandaj kaj komfortaj, estas unu- kaj du-litaj.

Por plibonigi la vivon de tiuj maljunuloj, la ĉina registaro donis monon kaj disponigis al ili dekelkajn servistojn kaj la maljunulejo sin okupis pri iuj entreprenoj. Kaj la maljunuloj, akceptitaj en la maljunulejon, ne plu ĉagreniĝas pro manĝo, loĝo, vesto kaj eventuala malsano. Maljunulino Anna sen ŝtataneco vivis tre malfacile antaŭ la enveno en la maljunulejon. Ŝi ofte ne havis manĝaĵon nek bonajn vestojn. La registaro loĝigis ŝin en la maljunulejo, faris por ŝi novajn vestojn kaj kuracis ŝian malsanon, ke ŝi revigliĝis.

La prizorgantoj de la maljunulejo multe klopodis, por ke la maljunuloj manĝu, vestigu, dormu kaj amuzigu bone. Por liberigi la maljunulojn de la soleco, oni starigis infanĝardenon en la korto. La naivaj kaj viglaj infanoj alportis al ili plezuron; por protekti ilian sanon, oni instruis al ili ĉigong-ekzercon, malfermis sportan ĉambron kaj ĝustatempe ekzamenis ilian korpon; konsidere ilian nacian kutimon, oni faris por ili naciajn kostumojn kaj preparis manĝaĵon laŭeble laŭ ilia gusto. En la festotagoj kaj naskiĝtagoj de la maljunuloj oni aranĝis por ili bankedon, en kiu la maljunuloj ĝoje levis glason por beni unu alian. Se iu maljunulo aŭ maljunulino malsaniĝis, la maljunulejo sendis homon flegi lin aŭ ŝin en nokto. En 1988 s-ino Majorie Fuller malsaniĝis je cerba hemoragio. Oni tuj ŝin portis al hospitalo kaj ŝi estis savita. Post la resaniĝo ŝi diris: “La ĉina registaro tre zorgas pri ni kaj bone aranĝas nian vivon. Mi estas tre kontenta. Ĉinio estas mia dua hejmlando.”

# Nia dubranĉa kulturo

de RETO ROSSETTI\* (Britio)



La aŭtoro

**E**N sia artikolo *Natura traduklingvo* William Auld diris ion tre dirindan. Bonaj esperantaj tradukoj povas ja redoni al ni la aromon kaj etoson de la originalo kaj peri al ni la tiulingvan kulturon por aldono al la kulturo esperanta. Kaj tio eblas, ĉar nia lingvo havis tuj dekomence indigenan stilon, kiun Zamenhof liveris kun la lingvo mem, kiam en 1887 li posedis jam ĝian spiriton kaj povis uzi ĝin senpere.

Kaj tion la eksteruloj ofte ne komprenas, ĉar ĝi ŝajnas neebla ĉe "artefarita lingvo" — termino pleonasma, ĉar la lingvo entute estas artverko, tiel grava, ke oni povas trafe difini la homon kiel lingvofaran beston, kiu kreas al si lingvojn ĉiam kaj ĉie. Kaj dank' al la lingvo la homo povas koncepti sian mondon, ne nur percepti kaj reagi al ĝi kiel la ceteraj bestoj. Mia tezo estas diskutbla, sed almenaŭ la okcidentaj (eŭropaj-usonaj) psikologoj konsentas, ke la hominfano fariĝas homo nur tiam, kiam ĝi akiras lingvon.

Ĉu la homo originalas aŭ tradukas per sia lingvo, tio estas akcesora konsidero. Kaj tamen ni aŭdis ke, ĉe Unesko en Montevideo (1954), la beata Blinkenberg diris, ke Esperanto *taŭgas eble por traduki urugvajajn menuojn sed nenio pli* (rimarko ne nur malĝentila kontraŭ la gastiganta lando, sed ofenda por la tuta popolo!) —

plumpa fuŝo, kiu ebligis al Lapenna turni la radon en la Asembleo por atingi sian (ja nian) venkon je la 10a de decembro.

Kaj simile ankaŭ aliaj eksteruloj sentencas pri Esperanto, ke ĝi taŭgas eble por tradukado sed neniel por originala verkado, montrante do sian elementan malkleron pri lingvo entute, ĉar sen establita originala stilo ne ekzistus lingvo, en kiun oni tradukus! La lingvo estas ja pli ol gramatiko kaj leksiko, ĝi estas instrumento por senco kaj emocio kaj tion ĝi akiras nur per la originala uzado.

Dank' al tio, jam post kvarjara uzado de la lingvo en la gazeto *La Esperantisto* (1889-1893) Zamenhof povis, kun la kuraĝo de juna genio, preni unu el la plej grandaj verkoj de la mondliteraturo *Hamleto* kaj ĝin traduki kun tono, senco, nuancoj tute kvazaŭ originala verko. Eĉ hodiaŭ tiu mirinda redono sonas al mi tute rekte kaj valide, kiel siatempe al Beaufront, kiu deklaris, ke ĝi superas la plej bonan francan tradukon.

Mi mem, kvankam sufiĉe konanta la originalon, trafis en la traduko de Zamenhof du lokojn, kiuj prilumis al mi la ĝustan sencan frazon, kiujn mi ĝis tiam ne sufiĉe atentis.

Do per *Hamleto* Zamenhof starigis normon kaj ekzemplon por la traduko de literaturaj verkoj. Kaj

li demonstris, ke estas eble iuloke eĉ superi la originalon, precipe en la galimatia kanto de la tombisto en l' unua sceno de la kvina akto, kie Zamenhof profitis la senkoheran tekston (de malklerulo, kiu memoras la arion sed ne la vortojn) por doni fluan lirikon:

*En la junaj miaj tagoj  
Mi amadis kaj kantadis  
Kaj en ĉiuj miaj agoj  
Mi mezuron ne sciadis.  
Maljuneco-lamulino  
Kaptis min per osta mano,  
Kaj al ĉio venis fino, —  
Restis ĝemoj kaj malsano.*

Jen kiel per *Hamleto* Zamenhof ilustris la principon, ke traduko devas ŝajni kiel originalo. Kiel tio estus ebla, se Esperanto ne posedus jam originalan tonon kaj stilon? Kiam mi diris foje al Newell, ke la zamenhofa traduko estas la dramo, kiun Ŝekspiro estus verkinata, se li disponus Esperanton kiel hejman lingvon anstataŭ la angla, li estis ŝokita. Mi tamen parolis simplan saĝon, ĉar tio devas esti la gvidilo por ĉiu serioza tradukanto. Kaj tion pravas la fruktoj: Ifigenio en Taŭrido, Rossumaj Universal-Robotoj, Peer Gynt, Kalevala, La robaijoj de Umar Kajjam. Kaj tia celado foje kondukas al lokoj, kie la traduko eĉ superas la originalon, kiel en la supra kanto de la tombisto. Tiujn eblojn oni devas profiti, ĉar tio parte kompensas la alilokan defici-



ton en la traduko.

Cetere troviĝas — rare sed aŭtentike — ankaŭ tutaj verkoj, kie la esperanta traduko superas la originalon. *La baptado de Caro Vladimir* — neniam tradukita anglan — (Havlicek — Pumpr), *Cynara* (Dowson — Auld), *Soneto el sanatorio* (Ferguson — Dinwoodie), *La sonoriloj* (Poe — Kalocsay). La diverslandaj legantoj de EPC certe povos alporti pliajn ekzemplojn.

Estas ankaŭ ĝenerala principo, ke traduko devas reprodukti la formon de la originalo. Tion ekzempligis Grabowski kiam en *Sinjoro Tadeo* li redonis la polan Aleksandron. Tiel klare eĉ, ke mi pli ol unu fojon deklamis partaĵon al polo nescianta Esperanton kaj li tuj divenis, ke tio estas Pan Tadeusz. Forlasi tiun trajton signifas perdi ion esencan, ĉar la formo

estas parto de la signifo. De *Peer Gynt* mi vidis plurajn anglajn tradukojn. Dum la originalo estas en plene rimitaj versoj, nur unu traduko provis imiti tion (kun malmulta sukceso), la ceteraj donis prozon. Ĉe unu teatra prezento la traduko estis reviziita de iu eĉ ne konanta la norvegan lingvon! En Esperanto tia filistreco ne estus imagebla kaj la ĝenerala nivelo de niaj tradukoj estas relative tre alta. Ni havas ja, dank' al E. A. Haugen, brilajn formfidelajn tradukojn de *Peer Gynt* kaj *Brand*; *la vigle flua Rossumaj Universal-Robotoj* (Ĉapek — Moraviaj Esperanto-Pioniroj) multe superas la anglan tradukon de tiu dramo, same plaĉas la *Elektitaj sonetoj* de Belli (tr. Pisoni), *Tridek jarojn en la Ora Nordo* (Welzl — M.E.P.) *Eu/geno Onegin* (Puŝkin — Nekrasov), *La Luzidoj* (Camoës —

Knoedt) kaj eble antaŭ ĉio *Infero* (Dante — Kalocsay) kiun mi komparis kun ses anglaj tradukoj je ties malavantaĝo. Ĉefa kaŭzo estas, ke en la angla la rimo estas malgrava dum en la itala kaj en Esperanto ĝi povas esti tensia punkto kaj saltobreto de senco kaj efekto.

Entute do nia kulturo estas du-branĉa, el originaloj kaj tradukoj. De ambaŭ ni havas similan estetikan travivaĵon, kun la aparta etoso de la originalo kaj aparta tembro de la aŭtoro. Kaj nur por tion ĝui, valoras lerni Esperanton. ■

---

\* S-ro Reto Rossetti estas delegito kaj faka delegito (arto, edukado, literaturo) de UEA en Gosport, Britio, universitata lektoro, konsilanto de la eldonejo ILTIS.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* 11-jara lernantino dez. kor. tm., kolektas pm., bk. kaj glumarkojn. Respondo garantiata. Olja Pjatova, ul. P-ŝteznika, d. 9, kv 22, g. Krasnojarsk, 6600 77, USSR.

\* Nomedo Vilkelyste, 17-j. junulino, dez. kor. tm., interesiĝas pri literaturo, filmo kaj muziko, kolektas bk. kaj kalendarojn. Adr.: 235000 Jonava, Chemiku 35-6, Litovio, USSR.

\* 17-j. gimnaziano volas kor. kun gejunuloj el Afriko, Azio kaj Orienta Eŭropo pri literaturo, muziko, junularaj kaj aliaj magazinoj. Stefano Sassenberg, Ulmenweg 5 D-3370 Seesen/Harz, FR Germanio.

\* E-kooperativo de peranto EPC en USSR peras ankaŭ en ekono-

mia, komerca, turisma kunlaboro inter USSR kaj Ĉinio. Invitas ankaŭ entreprenoj el aliaj landoj. Laborlingvoj: Esperanto kaj angla lingvo. Adr.: "Perko", Box 27, Postamt, Minsk, 220050 USSR.

\* Centro de orienta kulturo "Sekai" invitas labori en USSR specialistojn de uŝu, ĉigong, akupunkturo kaj aliaj orientaj (ĉinaj, japanaj) artoj. Ankaŭ ni povas proponi sovietiajn specialistojn de sporto. Adr.: "Sekai", Box 27, Postamt, Minsk, 220050, USSR.

\* Show-Grupo de centro "Sekai" dum diversaj internaciaj E-eventoj laŭ via invito povas prezenti programon pri uŝu, malmola ĉigong, karate, aikido ktp. Kaj invitas labori en nia show-grupo ĉinajn kaj japanajn majstrojn de luktartoj. Proponoj kaj invitoj sendu al: "Sekai-show", Box 27, Postamt, Minsk, 220050, USSR.

\* 19-j. studentino dez. kor. tm. pri floroj, ĉevaloj, arto, danco kaj manlaboroj. Adriana Zelezniak, ul. Francuska 6/7, 65-536 Zielona Gora, Pollando.

\* Mi dez. kor. en mondcivitana spirito! Parzival, Centro Lidja Zamenhof, Fb du Jura B, Ch-2502

Bielo, Svislando.

\* Mi volas interŝ. kasetojn surbendigitajn kun folkloraj, popolaj, modernaj aŭ antikvaj naciaj muzikoj de ĉiuj landoj. Adr.: Pekim Vaz, Caixa Postal, 3250, 69001-Manaus-Am, Brazilo.

\* Jan Torfs, 41-j., dez. kor. tm. nur por interŝ. uzitajn telefonajn kontojn. Adr.: Vrij Geweide 27, B-2200 Borgerhout, Belgio.

\* Petas vian helpon per bildkarto al ekspozicio kaj mi dez. kor., Armin Herfurth, Rosenwinkel 14 F 123, 3700 Wernigerode/Harz, DDR.

\* 79-j. tamen ankoraŭ vigla japana profesia tradukisto literatura serĉas ĉinajn klerajn korespondantojn, kiuj korektos miajn ĉinlingvajn leterojn. Rekompence mi korektos laŭdezire iliajn Esperantajn aŭ japanlingvajn leterojn. Adr.: Kurisu Kei, Mogusa Danti 154-1004, Hino-si, Tokio, 191 Japanio.

\* Dez. kor. Certe respondas. Jurij Marĉenko, Mira 3-78, Cjurupinsk, USSR-326520.

# Pekina biero de nova gusto

**E**N la frua printempo mi kun granda intereso vizitis la Unuan Pekinan Juĝan Ekspozicion de Ĉinaj Ekipaĵoj por Turismaj Hoteloj.

Mi haltis antaŭ la montrejo de la bierfarejo Huadu de Pekino kaj vidis, ke vizitantoj gustumas bieron ĉirkaŭ vazo el neoksidebla ŝtalo. Mi prenis glason kaj trinkis plenuŝon da biero. Ŝajnas al mi, ke la biero ne gustas forte. Mi do trinkis pli multe kaj tuj sentis agrablan kaj delikatan aromon. Poste mi interparolis kun du ofertistoj de la bierfarejo. Ili diris al mi, ke la bierfarejo estis finkonstruita en la lasta jaro. Nur kelkajn monatojn post ĝia ekproduktado ĝia biero partoprenis en la juĝa ek-

spozicio de novaj elstaraj produktaĵoj de la lando okazigita de la Malpez-industria Ministerio de Ĉinio. Konkuris pli ol 40 bierfarejoj, nur la biero kun marko "Longxiang" gajnis la premion por nova elstara biero en la juĝa ekspozicio.

Post kelkaj tagoj mi vizitis la bierfarejon Huadu en la norda antaŭurbo de Pekino.


La bierfarejo kovras areon de 180 000 kvadrataj metroj, kaj la plej okulfrapaj en ĝi estas dekoj da grandaj fermentigaj cilindraj ujoj altaj je pli ol 20 metroj. Ili, faritaj el neoksidebla ŝtalo, arĝente brilas sub la blua ĉielo.

Vicdirektoro Feng Xinghan diris al mi, ke Huadu estas la


ununura granda bierfarejo de Ĉinio kun jara produktokvanto de 100 000 tunoj da bonkvalita biero kaj 20 000 tunoj da malto. Por ĝia konstruado oni investis 260 milionojn da juanoj. La importado kaj apliko de modernaj alilandaj teknologio kaj instalaĵoj havigis al ĝi bazajn kondiĉojn por produkti bonkvalitan bieron.

Mi rigardis la ĉenproduktadon — farado de malto, sakarizo, fermentigo kaj enboteligo. Mi vidis, ke ĉiuj instalaĵoj estas el neoksidebla ŝtalo, ĉu en la laborejo de malto ĉu en la fermentejo. Ĉar la fermentado estas regata per komputilo, en tiel granda fermentejo laboras nur kelkaj homoj.

Fermentigaj cilindraj ujoj de la bierfarejo Huadu







En aŭtomata enboteligejo



Kontrolo de sakarizo de malto

En sakarizejo tri gigantaj sakarizaj ujoj ĉiufoje sakarizas po 90 tunojn da malto. Ili estas la plej grandaj sakarizaj instalaĵoj en Ĉinio. La sakarizo bezonas nur unu aŭ du laboristojn, kiuj plenumas la laboron en simila regadejo.

Kompare kun la supraj laborejoj, la enboteligejo havas multajn laboristojn. Kun la ritma movado de 4 enboteligaj linioj brue interpuŝiĝis boteloj, kaj laboristoj serioze kontrolis la kvaliton de ĉiu botelo da biero kaj senĉese elportis kestojn plenajn de bierboteloj. El tio oni klare vidas, ke estas orda la en-

treprenado de la granda bierfarejo kun iom malpli ol 800 personoj kaj lertaj laboristoj kaj oficistoj.

La vicdirektoro diris al mi ankaŭ, ke la bierfarejo nun produktas ĉefe bieron kun marko "Longxiang" en vitra botelo de 640 ml, en vitra botelo de 355 ml kaj en ladskatolo de 355 ml. Jam en majo de la lasta jaro, kiam la biero venis en la merka-

ton, ĝi trovis ŝaton de la konsumantoj. Iuj komercistoj de Eŭropo kaj Ameriko sin turnis al la bierfarejo por akiri la vendrajton de ĝia biero. ■

## POR VIA SANO

# Ĉina ĉigong-o

de XU SHITIAN

## II. NEJJANGGONG-O

Nejjanggong-o estas unu el la tradiciaj specoj de la ĉina ĉigong-o. Longa klinika praktiko montris, ke ĝi estas facile lernebla kaj bonefika sanprotekta terapio.

Antaŭ la ekzercado oni devas plene malstreĉi sin. Dum la ekzercado oni devas daŭre malstreĉi sin ĉu en teniĝo, ĉu en reguligo de la spiro kaj la menso. Oni nepre devas liberigi sin de streĉiteco kaŭzita de skrupulo pri la malsano, rigida teniĝo,


forta spiro, troa atento kaj strebo al iaj sentoj, kaj nur tiele oni povas ricevi bonan efikon de la ekzercado.

Antaŭ la ekzercado oni devas iri al necesejo, modere trinki akvon, demeti la ĉapon kaj okulvitrojn, malbutonumi la veston, disbuki la zonon pli vaste kaj konscie malstreĉi la kapon, torson, membrojn kaj muskolojn de la tuta korpo por aspekti kvietaj kaj malstreĉitaj. Nur tiam oni povas komenci la ekzercadon.

Oni povas ekzerci sin kuŝante sur flanko de la korpo, sidi en seĝo aŭ kun dorso sur apogilo.

Reguliginte la pozon, oni devas fiksi sian atenton sur la punkto *dantian* (je du coloj malsupre de la umbiliko), sin liberigi de ĉiu ajn penso kaj fari spiradon laŭ jenaj manieroj:

A. Malmola spirado per la nazo. Oni levas la langon al la supra makzelo ĉe la enspiro, nature enigis la aeron kaj kondukas ĝin per atento al la subventro kaj oni mallevas la langon ĉe la elspiro. Tion oni ripetadas. Tiu metodo konvenas al la malsanuloj ne grave suferantaj.



B. Mola spirado per la nazo kaj buŝo. Oni enigis nature la aeron kaj kondukas ĝin per la atento al la subventro ĉe la enspiro kaj elspiras senĝene. Post tio, oni ĉesigas la spiron kaj parkere legas frazojn, levante la langon al la supra makzelo. Oni mallevas la langon leginte la frazojn kaj denove spiras. Tion oni ripetas foje refoje. Tiu metodo konvenas al la debiluloj kaj malsanuloj grave suferantaj.

Por akiri bonan efikon nepre necesas reguligi la spiron kaj menson dum la ekzercado. Ĝenerale, kiam oni ekzercas sin per kvietaj ĉigong-o, oni fiksas sian atenton sur *dantian*, sed tio estas malfacila, ĉar de tempo al tempo venas al la ekzercanto en la kapon diversaj ideoj, kiuj mal koncentras la atenton. Por solvi tiun ĉi problemon oni povas parkere legi frazojn dum la ekzercado de nejjangong-o.


La parkera legado devas harmonii kun la spirado. Ĉe ĉiu spiro oni devas parkere legi frazojn, kies longecon decidigas la sanstato de la ekzercanto. Ĝenerale, li legas parkere "estu ja kvietaj", "malstreĉu min laŭeble", "malstreĉiĝo bonefike kuracas", "malstreĉiĝu por sano" ktp.

Farante la ekzercadon laŭ la maniero A, oni devas parkere legi la unuan vorton ĉe la enspiro, la duan ĉe la finiĝo de la enspiro kaj la lastan ĉe la elspiro. Tial ju pli longa estas la frazo, des pli longe daŭras la paŭzo inter enspiro kaj elspiro.

Farante la ekzercadon laŭ la maniero B, oni devas parkere legi la frazon post enspiro kaj elspiro, t.e., enspirinte, oni devas tuj elspiri, ĉesi enspiri kaj komenci parkere legi kaj post la finiĝo de la lego oni povas komenci refoje la spiradon.

La manieroj A kaj B ne povas esti uzataj samtempe nek alterne. Nun en ĉigong-terapijo oni ofte aplikas la manieron B.

Laŭ la teorio de la tradicia ĉina medicino oni opinias, ke la stomaka gaso devas malleviĝi. Ĉe la perturbo de la stomaka gaso, oni suferas de kapdoloro, kapturniĝo, hipertensio, sendormeco kaj songemo. Ek-



zercado de nejjangong-o povas efike reguligi la funkcion de la stomako kaj intestoj. Ĝi estas multe utila por kuraci ulceron de la stomako kaj duodena bulbo, gastroptozon, gastrodilatigon, gastrospasmon, hiperacidecon kaj kronikan gastroenteriton. Ĝi estas utila ankaŭ por kuraci kronikan hepatiton, pulman tuberkulozon, sili-kozon, neŭrastenion, dismenoreon ktp.

Preferindas ekzerci sin per nejjangong-o foje ĉiutage, po 30-60 minutoj matene aŭ vespere.

Fininte la ekzercadon, oni ne devas tuj stariĝi, sed anstataŭe oni devas unue aperigi la ideon pri ekzercofiniĝo kaj, ripozinte momenton, turni la kapon kaj kolon kelkfoje, froti la manojn ĝis varmiĝo kaj per ili froti la vizaĝon 20-30 fojojn. Post tio oni povas leviĝi kaj iri. Se la kruroj laciĝas, oni devas ripozi pli longe kaj leviĝi post plena malapero de la laciĝo. ■

## Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	KHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.6	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165



# Efikoplena ĉina kubo el EPCĈ


de RALF KUSE (GDR)

**K**IEL inĝenier-pedagogo de la praktika profesia edukado mi instruas estontajn elektromuntistojn en plastoprilaboranta entrepreno de Schwerin (Ŝverin) en la nordo de Germana Demokratia Respubliko. Jam kelkjure la revuo El Popola Ĉinio apartenas al mia fidela amiko dum diskutado kun miaj lernantoj. La bonfaritaj koloraj fotoserioj, la ĉina arto kaj sanigaj konsiloj estis ege ŝatataj, eĉ bonaj por-esperantaj varbiloj.

Sed unu artikolo eksterordinare influis mian profesion agadon. Ĝi estis legebla en n-ro 7/88 p. 45 sub la titolo: "Antikva ĉina Rubik-kubo — Liŭtong" kaj la sekvoj estis jenaj:

Post tralegado de tiu artikolo ekaperis la ideo konstrui tiun ĉinan kubon dum ekzercoj de miaj lernantoj. Ĉiam mi serĉas novajn, interesajn labortaskojn por plibonigi la metalprilaboradon, precipe dum la unuaj semajnoj de la praktika edukado. Ĉar mankis la mezuroj sur la desegno, mi mem provis kelkajn fajlitajn kubojn kaj fiksas la mezurojn.

Nun estis kontentiga pedagoga tasko por mi, klarigi la praktikan ekzercon, impresi miajn lernantojn per la belega revuo El Popola Ĉinio kaj samtempe varbi por Esperanto-kurso en la libertempo. Finfine la estontaj elektromuntistoj, kiuj ĝenerale malŝatas la komencan metalprilaboradon, laboris interese kaj kun granda entuziasmo. Ili decidis donaci la ĉinajn kubojn al solidareca bazaro por la viktimoj de la tiama tertremo en Armenio. Kvankam ne ĉiuj hodiaŭ okupiĝas pri Esperanto, en tiu komenca eduka



La aŭtoro

etapo ĉiuj partoprenis la E-kurson, skribis leterojn kaj eĉ gajnis premiojn pro E-prezentado dum kultura konkurso.

Sed ĉi tio ne estis la fino de la historio pri la ĉina kubo el tiu kajero... La tiama direktoro de nia profesia lernejo ekvidis la metalan kubon kaj esprimis, ke estas bonega produkto por la eduko de aliaj profesiaj direktoj en nia lernejo. Tiel la produktado de ĉina kubo el plasto estis decidita. Unue du estonaj inĝenieroj, kiuj tiutempe restadis en nia entrepreno laŭ kontrakto kun nia ĝemelentrepreno el Tallinn ricevis la taskon ellabori la konstruplanon. Kvankam en tiu etapo la E-rondeto kiel iniciatinto kaj modelkonstruinto preskaŭ estis forgesita, la internacia kunlaboro estis tute laŭ la interna ideo de Esperanto.

Poste la lernantoj kaj pedagogoj de la profesia grupo de metiilofarantoj konstruis la formon por la plastoprilaborantaj maŝinoj en la profesia lernejo. Fine la lernantoj, kiuj manipulis la maŝinojn, kunkonstruis kaj enpakis la "ĉinan kubon", kiu intertempe ŝanĝis la nomon al "ĉina nudo". Tiamaniere granda parto de la ŝtata eduka plano por tiu profesia grupo, kiel la muntado de plastaj pecoj, povas esti plenumita per la muntado de la ĉina nudo.

Ĉiutage ĉiu lernanto muntis tiel multajn nudojn, ke li povus fari tiun laboron eĉ dormante.

Dum distrikta ekspozicio de la lernantoj la farintoj de la ĉina nudo ricevis honoran titolon de la societo por germana-soveta amikeco.

Certe ankaŭ la praktika uzado de eksterlanda E-revuo efikis, ke la estintaj antaŭjuĝoj plue malgrandiĝis. Pro la subteno mi dankas kaj deziras al ni ĉiuj kaj precipe al El Popola Ĉinio grandiozajn sukcesojn. ■

# Sciencoj kaj teknikoj influantaj la ekziston de la homaro en la 90-aj jaroj

**S**PECIALISTOJ antaŭdiris, ke la civilizacio de kaj post la 21-a jarcento dependos de la decidoj faritaj de la homaro en la 90-aj jaroj.

Respondeculo de la Monda Futurologia Asocio diris: "Nun la homaro havas pli da povo direktsian propran sorton ol iam ajn antaŭe. Sed bedaŭrinde, ĝi ankoraŭ ne scias kiel bone uzi ĝin."

La plej grava problemo en la 90-aj jaroj estas, ke la medio detruas la klimaton, teron, akvon kaj atmosferon.

La Monda Observa Instituto nomas la 90-ajn jarojn jaroj de granda ŝanĝiĝo. Ĝi avertis, ke en multaj flankoj restas malmulte da tempo al la homaro. La futurologoj kaj medio-protektantoj tre zorgas pri la altiĝo de la temperaturo sur la terglobo, kiu influas aliajn faktorojn.

La sciencistoj unuanime opinias, ke la uzado de mineralaj brulaĵoj kaj detruado de arbaroj pliiĝas la kvanton de karbona dioksido en la atmosfero. Karbona dioksido kaj aliaj gasoj kiel varma tapiŝo kovras la terglobon kaj ne lasas disradiiĝi la varmon al la kosmo, kion oni nomas forĉeja efekto. Fine, la tero fariĝos varma, la glacio ĉe la norda kaj suda polusoj degelos, la klimato ŝanĝiĝos, la marnivelo altiĝos, la dispozicio de la monda agrikulturo detruigĝos kaj la proviz-kvanto de manĝaĵoj reduktiĝos.

Oni opinias, ke kloro-fluorokarbono, vaste uzata kemia

substanco, jam fariĝis polucio de la atmosfero, kiu detruas la ozonosferon, ke pli da transviolaj radioj sendiĝos sur la teron. Rezulte de tio, kreskos eble la nombro de suferantoj de haŭta kancero, la plantoj ne prosperos kaj la rikolto fariĝos magra. Laindustriaj rondoj kaj diverslandaj registaroj jam bone vidis la seriozecon de la problemo kaj subskribis la interkonsenton pri neuzado de kloro-fluorokarbono. Sed la atomoj de tiu kemiaĵo povas ekzisti 50 jarojn. Tial la detruigo de la ozonosfero daŭros longe eĉ post la 90-aj jaroj.

La registaroj de diversaj landoj alprenas ankaŭ rimedojn por solvi aliajn mediajn problemojn, kiaj acida pluvo, akva polucio, traktado de balaĵoj kaj malapero de iuj vivaĵoj. Ĉu tiuj rimedoj efikos aŭ ne, tio dependos ankaŭ de la volo de la homaro en la 90-aj jaroj.

Laŭ la enketo de la Monda Futurologia Asocio, la mondsfera ekonomia ĥaoso estas la dua problemo, pri kiu zorgas la homoj. La diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj kaj tiu inter la triamondaj kaj evoluintaj landoj eble pligrandiĝos multe en la 90-aj jaroj.

La tria problemo estas nuklea milito, kiun oni delonge rigardas kiel la plej grandan minacon al la mondo. Specialistoj asertis, ke pro la degelado de malvarma milito la maltrankvilo mildiĝis, sed ankoraŭ dispoziciigis misiloj en la Oriento kaj Okcidento.

La kvara problemo en la 90-aj jaroj estas, ke la nombro de toksigemuloj kreskas en iuj landoj. Multaj loĝkvartaloj de urboj fariĝis merkatoj de kokaino kaj aliaj narkotaĵoj. Krimagoj rilate narkotaĵojn de tempo al tempo okazas. En multaj lokoj de Usono oni kontraŭleĝe kulturas kanabon (*Cannabis indica*) kaj heroino serioze detruas la sanon de junuloj.

La futurologoj rigardas aidekson la kvina problemo en la 90-aj jaroj, kvankam iuj specialistoj opinias, ke ĝi devas esti en la unua loko. Koncerna instituto de Usono antaŭdiris, ke ĝis la fino de la 90-aj jaroj 1.5 milionoj da homoj mortos pro aids. Ĝi avertis, ke ĝis la jaro 2002 14.5 milionoj da usonanoj estos infektitaj de aids-viruso, se oni ne trovos novan metodon ĝin preventi kaj kuraci, kaj ke ne reduktiĝos la nombro de mortintoj pro aids, se la seksaj rilatoj de usonanoj ne ŝanĝiĝos radikale.

Kvankam en la 90-aj jaroj troviĝas multaj maltrankviligaj problemoj, tamen la nova jardeko alportos al la homaro novan grandan esperon.

En la kampo de medicino la sciencistoj prove malkovras heredajn cifrojn kaj lernas kiel ŝanĝi la vivaĵon. Nun oni ŝanĝas genojn de vegetaĵoj kun la celo altiĝi produktokvanton, forigi plantmalsanojn kaj mortigi fiinsektajn, tiel ke en la jardeko espereble produktiĝos pli da manĝaĵoj sen polucio de kemiaĵoj.



● La subskriba aktivado de miliono da homoj por “la Azia Sportkunveno, turismo, amikeco kaj paco” iniciatita de la Pekina Turisma Administracio komenciĝis en Tian’anmen-turo kaj aliaj vizitindejoj de Pekino la 2-an de aprilo. La aktivado, kun turismo kaj sporto kiel ponto, celas pligrandigi la influon de la Azia Sportkunveno, allogi pli da turistoj kaj akceli la mondan pacon. Antaŭ tio, la unua ĉina telefono kun numero 5130828 por “turisma konsultigo” ekfunkciis. Ĝi estas uzata speciale por trakti la opiniojn de turistoj pri la servo kaj doni konsultigon al ili.

● La grandioza turisma servo “Vojaĝo laŭ la Silka Vojo” estis lanĉita lastatempe de la turismaj servoj de la urbo Hangzhou, la provincoj Shaanxi, Gansu kaj la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono por alilandaj turistoj. La turisma itinero komenciĝas oriente ĉe la Okcidenta Lago en Hangzhou, fama vidindejo de Ĉinio, kaj finiĝas okcidente ĉe la antikva urbo Kaŝi de Xinjiang, traŭrante Xi’an, Lanzhou, Dunhuang kaj Urumqi. Laŭ la itinero la turistoj povas ĝui mondfamajn vidindejojn kaj historiajn restaĵojn, kiaj terakotaj ĉevaloj kaj militistoj malkovritaj en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, freskoj en Mogao-ŝtonkavernaro kaj ruino de la antikva urbo Gaochang en Turpan.

● Ekfunkciis la unua aŭkcias firmao de artaĵoj en la Okcidenta Yan’an-strato de Ŝanhajo. Ĝi aŭkcias diversajn artaĵojn, inkluzive malnovajn kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn, jadaĵojn, eburajn skulptaĵojn kaj ŝtonajn stampilojn, kaj ankaŭ malnovajn meblojn.

● Antaŭ nelonge, estis malkovrita kavernoĉeno, pli ol 6 km longa kun areo de ĉ. 33 000 kvadrataj metroj, en la gubernio Qiyang, Hunan-provinco. En ĝi staras ŝtonkolonoj kaj stalagmitoj kaj ponte inter-



En la fabriko de elektronikaj konektiloj kaj ŝtopilingoj de la Changli-a Limigita Kompanio

ligiĝas montoj, riveroj, lagoj kaj akvofaloj. La pejzaĝo estas ĉarma kaj havas altan scienc-esploran valoron.

● Antaŭ nelonge 14-jara knabino Wang Yani de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono de Ĉinio estis enlistigita de la Disney-a Mickey-Musa Klubo de Usono kiel monda kultura eminentulo kaj honorita per la donaco ora muso. Ŝi eklernis pentradon en la aĝo de 2 jaroj. Ĝis nun ŝi jam faris pli ol 10 000 pentraĵojn pri homoj, pejzaĝoj, bestoj k.a.

● Antaŭ nelonge, okazis en Tokio la premiero de la filmo “Judou” kune produktita de Ĉinio kaj Japanio. Ĝi estis bonvenigata de la rigardantoj. La filmo prezentas la amon de paro da gejunuloj katenata de feŭda ideologio en la 20-aj jaroj de la kuranta jarcento.

Sciencistoj desegnas grafikon de kompleksaj genaroj de la homa korpo. Baldaŭ ili trovos la genojn malsanigajn. La medicinistoj provas anstataŭigi difektitajn genojn per la normalaj.

Dank’ al la progreso de la tekniko kaj apero de novaj medikamentoj, provataj nun, kuracistoj povos transplanti ĉian organon de la korpo kaj fari ankoraŭ pli fortan batalon kontraŭ kormal-sano kaj kancero en la 90-aj jaroj.

Iras la revolucio kadre de la materiala scienco kaj ĝi certe rapidiĝos en la venontaj jaroj. La malpeza, fortika plasto kaj ceramikaj materialoj anstataŭas me-

talon uzatan por aeroplano, aŭto kaj konstruaĵo. Nun en la laboratorioj de diversaj lokoj de la mondo sciencistoj provfaras superkonduktivajn materialojn, kiuj povas kondukti elektron en stato de nula rezistanco. Tio donos la eblecon altigi rendimenton de elektra transmision, multe akceli la operaciadon de komputilo kaj rapidigi surfervojan transportadon.

En la kampo de elektroniko sciencistoj uzos icon (integra cirkvito) en hejmaj objektoj, aŭtoj kaj instruiloj. Iuj sciencistoj antaŭdiris, ke en la 90-aj jaroj persona komputilo estos uzebla

en centoj da flankoj kaj fariĝos nemankigebla en hejmo kiel telefono.

La kombino de superkomputilo kaj nova matematiko ebligos al sciencistoj doni plej kompleksajn kaj apartajn tipojn de hazardaj eventoj, tiel ke la homaro povos bone koni la klimaton, tertremojn kaj ekonomian tendencojn.

Lerte uzi novajn perspektivajn teknikojn helpos solvi multajn evidentajn problemojn en la 90-aj jaroj, dume la internacia kunlaboro estos nemankigebla. ■

BIAN WEN:

# Pekino





# birdvidata

Sur la nord-suda akso Foto de ZHANG ZHAOJI



**E**STAS malfacile havi panoraman vidon de Pekino, se oni ne rigardas ĝin birdvide.

Pekino ŝanĝiĝas kun ĉiu tago. Ĉie vidiĝas etaĝdomoj kaj trefkruciĝoj... Sed oni vidas nur parton de la urbo. Kia do ĝi aspektas, se rigardi ĝin birdvide?

En bela aŭtuno mi havis la ŝancon flugi super Pekino. Tra fenestro de la helikoptero mi vidis sennombrajn etaĝdomojn, stratojn, arbojn, florojn, riverojn, lagojn kaj montojn. Malaltaj kvadrataj kortoj estas anstataŭitaj de novaj diversformaj konstruaĵoj; novaj loĝkvartaloj aperas sur antaŭaj vakaj lokoj, kiel bambuido post pluvo. En la ombroriĉaj Beihai-parko, Taoranting-parko, Somera Palaco kaj

Zizhuyuan-parko navetis plezurboatoj sur lagoj. La larĝaj 2-a, 3-a kaj 4-a konstruata rondŝoseoj ornamas la urbon kiel flirtaj rubandoj. Kaj la belaj trefkruciĝoj, kiel perloj inkrustitaj sur la rubandoj, interligas la ĉefajn stratojn de la urbo.


En la pasinteco la guberniaj urboj en la antaŭurbo de Pekino estis nur malgrandaj urbetoj kun tre malmultaj etaĝdomoj. Nun la sateliturboj Changping kaj Daxing havas rudimentan formon kaj ankaŭ en la guberniaj urboj Tongxian, Huairou kaj Shunyi staras originalaj etaĝdomoj. Ili sidas ĉirkaŭ Pekino kiel steloj ĉirkaŭ la luno.

Poste nia helikoptero flugis norden laŭ la nord-suda akso de la urbo kaj mi sate ĝuis la




La Preĝejo por Riĉa Rikolto

Foto de WANG ZHENMIN







Trefkruciĝo sur la tri rondŝoseo


Foto de **WANG ZHENMIN**

Malnova loĝkvartalo



Foto de **GAO HONG**



vidadon de la imponaj antikvaj konstruaĵoj kiel Embrazura Turo sur Qianmen-pordego, Tian'anmen-pordego, Imperiestra Palaco, Jingshan-parko, Sonorila Turo kaj Tambura Turo. Ĉe la sunsubiro la glazuritaj tegoloj sur la konstruaĵoj trembrilis, kvazaŭ ĉielarko trairanta la urbon de sudo al nordo. La Imperiestra Palaco, la plej majesta konstruaĵaro en Pekino, kaj dekoj da altaj etaĝdomoj ĉirkaŭe formas harmonie la novan fizionomion de Pekino, antikvan kaj modernan. ■



Strato en la urbo Foto de **ZHANG ZHAOJI**




La Somera Palaco Foto de **HU WEIBIAO**





La lagoj Nanhai, Zhonghai kaj Beihai Foto de **ZHANG ZHAOJI**



# Loĝejoj de la imperiestraj edzinoj en la dinastioj Ming kaj Qing

Teksto de MU YI


Fotoj de LUO WENFA kaj GU HUA

**E**N la orienta kaj okcidenta partoj de la interna korto de la Imperiestra Palaco sidas po 6 kortoj, kiuj funkciis kiel loĝejoj de la imperiestraj edzinoj en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911).

Tie ĉiu korto estas kompleta apartamento el antaŭa, posta kaj flankaj domoj. Tie arboj kaj floroj punktas la kortojn, belaj pentraĵoj ornamas la kolonojn kaj trabojn. Nun parto de la 6 orientaj kortoj estas eksponejoj de antikvaj bronzaĵoj kaj ceramikaĵoj, dum la 6 okcidentaj kortoj konservas sian originan aspekton.

Tie troviĝas ankaŭ malaltaj dometoj. Ili estis loĝejoj aŭ deĵore-

## PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-roj 14 kaj 15 en la plano signas loĝejoj de imperiestraj edzinoj.

joj de eŭnukoj kaj palacaj servistinoj.

Eŭnukoj estis kastritaj servistoj en la Imperiestra Palaco. Ili plejparte devenis de malriĉa familio, brute laboris la tutan vivon kaj senilaj estis elpelitaj el la palaco kaj fine mortis tre mizere. Nur tre malgranda nombro da ili estis favorataj de la imperiestro aŭ ties edzinoj kaj funkciis kiel politikaj potenctenantoj.

La servistinoj estis venigitaj en la palacon ĝenerale en la aĝo de ĉ. 10 jaroj kaj tie estis ŝarĝitaj per servo al la imperiestraj edzinoj. Ĉe ajna malkontento de la mastriroj la palacaj servistinoj estis insultitaj aŭ batitaj, iuj eĉ mortigitaj. Troviĝis ankaŭ iuj, kiuj sin mortigis, ne povante elteni la turmenton. Nur tre malmultaj el la servistinoj ricevis favoron de la imperiestro kaj fariĝis liaj kromedzinoj. Tial elekto de palacaj servistinoj estis malfeliĉo por la ordinaraĵoj. Januare de 1568 onidiro cirkulis sude de Yangzi-rivero, ke la kortego decidis elekti palacajn servistinojn, kaj sekve de tio multaj knabinoj haste edziniĝis tute senpripense. El tio oni vidas, kiel terurigi la popolanojn ĉe la onidiro.

Pri la nombro de la imperiestraj edzinoj mankis difino en Ming-dinastio. Historiaj kronikoj notis, ke escepte de la unua imperiestra edzino ĝenerale estis pli ol 10 kromedzinoj, kies tasko ĉefe estis naski infanojn por la imperi-

estro.

En la okuloj de ordinaruloj la imperiestraj edzinoj vivis lukse, feliĉe, sed fakte ne tute tiel. Multaj nefavoritaj kaj favorperditaj el ili estis forlasitaj de la imperiestro, vivis solece kaj eĉ estis mortigitaj. Kiam la imperiestro mortis, iuj el ili estis mortigitaj por akompani la mortintan suverenon. Kompreneble ankaŭ estis iuj, kiuj, longtempe favorataj de la imperiestro, despotis en la palaco.

La imperiestro de Ming-dinastio Zhu Jianshen (1465-1487 sur trono) estis flegata de servistino Wan, kiam li estis malgranda knabo. Kiam la 16-jara Zhu Jianshen surtroniĝis, Wan jam estis 35-jara. Ŝi, ĉarma kaj sprita, koketis al la juna imperiestro kaj fine kromedziniĝis al li kaj firme tenis lin en siaj manoj. En 1466 Wan naskis filon, pro kio ŝi estis promociita supera kromedzino, sed baldaŭ ŝia filo mortis, kaj poste ŝi neniam gravediĝis. Por ne perdi la favoron de la imperiestro, ŝi abortigis ĉiujn aliajn imperiestrajn kromedzinojn, kun preteksto kuraci ilin. Foje palaca bibliotekistino Ji kuŝis kun la imperiestro kaj gravediĝis. Informiĝinte pri tio, Wan ekkoleris kaj ordonis senprokraste abortigi ŝin. Sed la komisiita palaca servistino mensogis, ke Ji suferas de tumoro en la abdomeno, sed ne gravediĝis. Naskiĝinte, la bebo estis nu-





La okcidenta parto de la interna korto de la Imperiestra Palaco

trata en la okcidenta domo, kion oni kaŝis antaŭ Wan. Iutage post 6 jaroj la imperiestro Zhu vespiris: "Mi baldaŭ maljuniĝos, sed filon ankoraŭ ne havas." Iu eŭnuko, kiu konis la aferon pri la princo, informis la suverenon pri la filo. La imperiestro ekĝojis, ordonis venigi la knabon kaj nomumis ankaŭ lian patrinon Ji supera imperiestra kromedzino. Ĉiuj ĝojis escepte de Wan, kiu estis malcontentega pri la afero. Post nelonge Ji mortis subite. Oni diris, ke ŝin murdis Wan. Por la sekureco de la knabo la imperiestra patrino prenis sur sin la taskon flegi lin. Foje Wan invitis la knabon al manĝo. Ĉar lia avino permesis al li manĝi nenion ĉe Wan, tial li diris: "Mi timas toksigi," kiam Wan proponis al li la manĝon. Wan ekbolis de kolero:

"Juna, li traktas min tiel, estonte mi eble mortos en liaj manoj." Wan malsaniĝis kaj mortis post nelonge. La knabo nomiĝis Zhu Youcheng, poste li imperiestriĝis por 18 jaroj.

En Qing-dinastio krom la imperiestra edzino estis ankaŭ imperiestraj kromedzinoj de 7 rangoj. Ĝenerale ne estis difinita nombro de kromedzinoj. Sed iuj imperiestroj ofte pliiĝis la nombron. En la lastaj jaroj de la dinastio la imperiestro Guangxu havis nur 3 edzinojn, pro kio la orientaj kaj okcidentaj kortoj estis ne tiel viglaj.

La plej despota el la imperiestraj edzinoj en Qing-dinastio estis Cixi (1835-1908), kiu regis Ĉinion dekojn da jaroj. Ŝi estis diktatora en politiko kaj diboĉa en

vivo. Ĉiu ŝia manĝo konsistis el pli ol cent pladoj, inkl. de pli ol 20 specoj de kukoj. Ĉiufoje dum la manĝado antaŭ ŝia sidloko viciĝis pluraj orumitaj kvadrataj tabloj. Dekoj da eŭnukoj surtabligis la pladojn laŭvice. Ili metis proksimen al ŝi la ŝatatajn pladojn. Ĉiu ŝia manĝo kostis cent ĝis mil taelojn da arĝento, kiom la elspezo de ordinara kamparano por dekoj da jaroj. La datreveno de ŝia naskiĝo estis ĉiam solenita lukse. La 10-a de la 10-a monato 1884 estis la 50-a datreveno de ŝia naskiĝo. Por festi tiun tagon, ŝi ordonis ripari kaj dekoracii la 6 okcidentajn kortojn, pro kio la ŝtato elspezis 3 milionojn da taeloj da arĝento. La belaj pentraĵoj en kaj ekster la domoj, la gravuritaj pordoj kaj fenestroj el nanmu-ligno, la bron-



Yikun-palaco

Interne de Chuxiu-palaco

zaj drakoj kaj cervoj, ĉio ĉi estis farita tiutempe. Por soleni la 60-an datrevenon de sia naskiĝo, ŝi ordonis anticipe ripari kaj dekoracii la Someran Palacon, kie ŝi loĝis plurfoje, per la mono de la mararmeo. Ĉe la datreveno survoje de la Imperiestra Palaco ĝis la Somera Palaco leviĝis 60 vidindaĵoj, kiaj arkaĵoj kaj scenejoj. La dekoracio de la domoj, la festenoj kaj donacoj konsumis entute pli ol 10 milionojn da taeloj da arĝento.

La okcidentaj kortoj, kiujn oni nun vidas, montras sian ĝeneralan aspekton en la regperiodo de la imperiestro Qianlong (1736-1796 sur trono) de Qing-dinastio. La palaco Chuxiu tenas sin tia, kia ĉe la 60-a datreveno de la naskiĝo de Cixi: Ĉarmas sur tabloj miniaturaj envazaj pejzaĝoj el smeraldo, jado kaj alispecaj multekostaj ŝtonoj, pompas eburaj ekranoj kaj brilas lanternoj sur la plafono, elegantas delikata tualettablo k.a. Ĉio ĉi montras la altnivelan metiarton kaj ankaŭ la luksan kaj diboĉan vivon de la imperiestraj familioj. ■







En la mezo de Chuxiu-palaco



Loĝejo de imperiestra edzino en Changchun-palaco



Bronzaj bestoj antaŭ Chuxiu-palaco



# Ĉina Masaĝo

Ĉu vi volas ellerni masaĝon por kuraci malsanojn? Do la videobendo "Ĉina Masaĝo" kontentigos vian deziron.

S-ro Zhang Tao, esploristo kaj direktoro de la ostologia fakto de Guang'anmen-hospitalo sub la Ĉina Ĉin-medicina Instituto, multe kontribuis per masaĝo kontraŭ ostaj vundoj, kaj s-ro Zhang Chunpu, vicesploristo de la hospitalo, estas lerta en masaĝo kontraŭ internaj malsanoj. La videobendo konigas, kiel ili masaĝas por kuraci ostajn vundojn kaj oftajn internajn malsanojn, kiaj akuta lumba artiktordo, koltordigo, doloro ĉe ripoj dum spirado, nerva kapdoloro, malvarmumo, vomado k.a.

La videobendo estas facile komprenebla kaj imitebla, kaj donas bonan efikon. Ĝi estas dezirata lernilo por komencantoj, studmaterialo por medicinistoj kaj ankaŭ necesajo por ĉiu familio. La videobendo longas je 75 minutoj, en la eldonoj ĉina kaj Esperanta.

La videobendo estas produktita kune de El Popola Ĉinio, Guang'anmen-hospitalo sub la Ĉina Ĉin-medicina Instituto kaj la eldonejo "China Reconstructs".

Prezo (inkluzive de sendkosto): USD 80.00; Mendodezirantoj sendu la pagon al:

El Popola Ĉinio, 24 Baiwanzhuang Rd. P/A Bank of China (Head Office) Beijing, China

ĈINA MASAĜO

中國按摩

CHINESE  
MASSAGE

ĈINA M

ĈINA MASAĜO

中國

CHI  
MAS

中國按摩

CHINESE  
MASSAGE

